



团结起来
争取更大的胜利

中华人民共和国万岁

中华人民共和国万岁

庆祝全国人民代表大会

庆祝无产阶级专政

紧密团结在以毛主席为首林副主席为副的党中央

EL POPOLA ĈINIO

**Aklamu la grandajn venkojn
en la socialisma revolucio
kaj socialisma konstruado
dum la lastaj 20 jaroj!**

**Aklamu la grandan venkon
de la Granda Proletara Kul-
tura Revolucio!**

**Aklamu la grandan venkon
de la Naŭa Tutlanda Kon-
greso de la Komunista Par-
tio de Ĉinio!**



Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, viglanima kun radianta spirito, revuas sur la pordego Tian-anmen la paradon celebrantan la nacian feston de la 20-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.



Reprezentantoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj ĉeestantaj la nacifestan revuon varme ĝojkrias: “Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!”


Kune kun la armeanoj kaj popolanoj en Pekino fremdlandaj amikoj el diversaj lokoj de la mondo ĝoje festas la 20-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.





Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin

Prezidanto Lin Biaŭ Datrevenon de Respubliko Kune



EN la 1-a de oktobro, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ ĝoje celebris la 20-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, kune kun pli ol kvarcent mil armeanoj kaj popolanoj de la ĉefurbo kaj reprezentantoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj el diversaj lokoj de la tuta lando. Solena celebra mitingo kaj parado okazis sur Tian-anmen-placo.

La Ĉina Popola Respubliko persone kreita kaj gvidata de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ trapasis sian brilan vojon de 20-jara malfacila batalado laŭ la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj jam fariĝis progresinta socialisma lando, kiu staras kvazaŭ giganto en la oriento de la mondo. En la brila festotago, la popolo de la ĉefurbo entuziasme aklamas kun senlima ĝojo la grandajn venkojn akiritajn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando en la pasintaj dudek jaroj, la grandan venkon de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la grandan venkon de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la grandan venkon de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

En la festotago, Tian-anmen-placo aspektis majesta kaj impone bela. Sur Tian-anmen-pordego, flirtis ruĝaj flagoj kaj giganta portreto de Prezidanto Maŭ alte pendis meze sur ĝia ruĝa muro. Ambaŭflanke de la placo staris portretoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin. Ĉe la suda rando de la placo staris portreto de Sun Jatsen. Kolosaj tabuloj starantaj antaŭ la Monumento de Popolaj Herooj portis la surskribon de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ: “Unuigu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn”.



Maŭ kaj Vicprezidanto

Celebris la 20-an

la Fondiĝo de la Ĉina Popola kun Revoluciaj Popolamasoj

Je la deka atm., en la majesta muziko *Ruĝas la Oriento*, la granda gvidanto de niaj ĉiuj nacioj Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin firmpaŝe ascendis Tian-anmenpordegon. La tuta maro de homamasoj ekbolis en ĝojo. La revoluciaj amasoj senescepte direktis sian rigardon alten al Prezidanto Maŭ, turnis sian koron al la ruĝa suno kaj alte tenante la brile ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kriadis kun senkompare forta emocio: “Vivu Prezidanto Maŭ!” “Vivu Prezidanto Maŭ!” “Longan, longan vivon al Prezidanto Maŭ!” En brila sano kaj plena energio, Prezidanto Maŭ ame mansvingadis al ili kun rideto. Kun vigla animo, Vicprezidanto Lin staris apud Prezidanto Maŭ, svingante la ruĝe brilantan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Ekvidante ke la tage kaj nokte sopirata Prezidanto Maŭ estas en brila sano, la dek mil reprezentantoj de laboristoj, kamparanoj, soldatoj, ruĝgvardianoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj sur Tian-anmenpordego kaj la altanoj, venintaj el diversaj lokoj de la lando sentis senliman feliĉon kaj saltante ĝojkriadis kore al Prezidanto Maŭ. Sur la placo, pli ol cent mil revoluciaj celebrantoj formis per bukedoj kvin orajn ideografiaĵojn signifantajn “Vivu Prezidanto Maŭ”.

Prezidanto Maŭ ĉiam estas kune kun ni kaj ĉiam ligiĝas kun ni koro ĉe koro. Starante sur Tian-anmenpordego, Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin revuis la grandan armeon de paradantoj de la ĉefurbo kaj intime manpremis kaj interparolis kun la reprezentantoj venintaj el diversaj lokoj de la lando al Pekino por la celebrado, respondecaj kamaradoj de diversaj flankoj kaj

revoluciaj kunbatalantoj kaj amikoj el la kvin kontinentoj de la mondo. La ĝoja kriado “Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!” potence resonadis en la aero super la placo.

Kune kun Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin la paradon revuis sur Tian-anmenpordego membroj de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPC Ĝou Enlaj, Ĉen Boda kaj Kang Ŝeng, membroj de la Politika Buroo de la Centra Komitato estantaj en Pekino (listigitaj laŭ la ordo de la nombro de strekoj de la familiaj nomoj) Je Kjun, Je Gianjing, Liu Boĉeng, Giang King, Ĝu De, Li Hiannian, Li Zuopeng, Vu Fahian, Kiu Hujzuo, Jaŭ Venjuan, Huang Jongŝeng, Dong Bivu kaj Hie Fuĝi kaj kandidata membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato Vang Donghing.

La revuadon partoprenis ankaŭ: vicprezidantoj de la Komisiono pri Militaj Aferoj de la Centra Komitato de KPC Ĉen Ji, Hju Hiangkian kaj Nie Jongĝen;

Vicprezidanto de la Ĉina Popola Respubliko Song Kingling;

Vicĉefkomitatanoj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso He Hiangning, Guo Muoĵuo, Ngapo Ngavangĝigme kaj Ĝou Gianjen;

Vicĉefministroj de la Ŝtata Konsilantaro Ĉen Jun kaj Li Fuĉun;

Vicprezidantoj de la Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco Deng Zihuj, Li Siguang, Fu Zuoji, Teng Dajjuan, Hju Deheng kaj Li Dekjuan.



La imponaj paradaj vicaroj de la amasoj marŝas tra Tian-anmen-placo kaj akceptas la revuon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin.

Sur la pordego ankaŭ estis 995 elektitoj el la dek mil reprezentantoj de laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la Popola Liberiga Armeo, ruĝgvardianoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando.

Honorindaj gastoj eksterlandaj invititaj por partopreni la celebradon sur Tian-anmen-pordego estis:

Choi Yong Kun, estro de la Korea Partia kaj Registara Delegacio, membro de la Prezidantaro de la Politika Komitato de la Centra Komitato de la Korea Labora Partio, sekretario de la Centra Komitato kaj prezidanto de la Konstanta Komitato de la Supera Popola Asembleo de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

Pham Van Dong, estro de la Vjetnama Partia kaj Registara Delegacio, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio kaj ĉefministro de la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, Le Thanh Nghi, vicedstro de la delegacio, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de LPV kaj vicĉefministro, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

Haki Toska, estro de la Albana Partia kaj Registara Delegacio, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj vicprezidanto de la Konsilantaro de Ministroj de la Albana Popola Respubliko, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

Nguyen Huu Tho, estro de la Delegacio de la Sudvjetnamia Naciliberiga Fronto kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio, prezidanto de la Prezidantaro de la Centra Komitato de la Sudvjetnamia Naciliberiga Fronto kaj prezidanto de la Konsila Komitato de Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

Leŭtenant-generalo Lon Nol, estro de la Registara Delegacio de Kamboĝo kaj ĉefministro de la registaro de la Reĝlando de Kamboĝo, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

Majoro Alfred Raoul, estro de la Delegacio de la Landa Konsilantaro de Revolucio kaj Registaro de la Respubliko de Kongolando (Brazzaville), estrarano de la Landa Konsilantaro de Revolucio de la Respubliko de Kongolando (B),



ĉefministro kaj prezidanto de la Registara Konsilantaro, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

Leŭtenant-generalo Abdul Hamid Khan, estro de la Amika Delegacio de la Pakistana Registaro kaj estro de la Stabo de la Pakistana Armeo, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

Hamid Ould Mouknass, estro de la Registara Delegacio de Maŭritanio kaj ministro de eksteraj aferoj de Maŭritanio, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

R. P. Giri, estro de la Delegacio de la Registaro de Lia Majesto de Nepalo kaj ministro de komunikado, transporto kaj publikaj laboroj, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

Peter A. Kisumo, estro de la Tanzania Amika Delegacio, ŝtata ministro por regiona administrado kaj kampara disvolviĝo en la Prezidanta Oficejo de Tanzanio, membro de la Landa Asembleo kaj membro de la Centra Komitato de la Landa Plenuma Komitato de la Tanganika Afrika Nacia Unuiĝo, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

Lansana Diane, estro de la Delegacio de la Landa Politika Buroo de la Gvineo Demokratia

Partio kaj la Gvineo Registaro, membro de la Landa Politika Buroo de la Gvineo Demokratia Partio kaj ministro de enlandaj aferoj, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

Mohand Said Mazouzi, estro de la Delegacio de la Registaro de la Demokratia Popola Respubliko de Alĝerio kaj ministro de laboro kaj sociaj aferoj de Alĝerio, kaj membro de la delegacio;

Aurel Duma, reprezentanto de la Registaro de la Socialisma Respubliko de Rumanio kaj rumana ambasadoro al Ĉinio, kaj lia edzino;

Abu Kasem, estro de la Delegacio de la Palestina Naciliberiga Movado kaj gvida membro de la Palestina Naciliberiga Movado (Al Fatah), Abu Salem, alia gvidanta membro de la Palestina Naciliberiga Movado (Al Fatah), kaj membro de la

delegacio Abu Omar;

La kamboĝa ambasadoro al Ĉinio Nay Valentin kaj lia edzino, la pakistana ambasadoro al Ĉinio K. M. Kaiser kaj lia edzino, la nepala ambasadoro al Ĉinio Ranadhir Subba kaj lia edzino, la gvineo provizora aferŝargito al Ĉinio Fode Issiaga Camara kaj la edzino de la gvineo ambasadoro al Ĉinio Ansou Kamano, la alĝeria ambasadoro al Ĉinio Mohamed Cherif Sahli, kaj estro de la Senditaro de la Palestina Liberiga Organizo en Pekino Housni Younes kaj lia edzino;

Thakin Ba Thein Tin, estro de la Delegacio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Birmo kaj vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Birmo kaj membro de la delegacio;

N. Sanmugathan, estro de la Delegacio de la Komunista Partio de Cejlono, ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Cejlono kaj membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Cejlono;

Yusuf Adjitorop, estro de la Delegacio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Indonezio kaj membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Indonezio;



Reprezentantoj de la Liberiga Armeo venintaj de la plejfronto de subteno al industrio, agrikulturo kaj maldekstruloj kaj de plenumo de milita kontrolo kaj milit-politika trejnado kore deziras al Prezidanto Maŭ senlime longan vivon!

G. Bylin, estro de la Delegacio de la Komunisma Ligo Marksist-Leninista de Svedio kaj prezidanto de la Komunista Ligo Marksist-Leninista de Svedio, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

Fosco Dinucci, ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Italio (Marksist-Leninista);

Nguyen Thi Ngoc Lien, estrino de la Delegacio de Sudvjetnamiaj Junuloj, Herooj kaj Kuraĝaj Batalantoj kontraŭ Usonaj Agresantoj kaj vic-komandanto de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Bienhoa-provinco en suda Vjetnamio, kaj ĉiuj membroj de la delegacio;

Djawoto, ĝenerala sekretario de la Azia-Afrika Ĵurnalista Asocio kaj lia edzino;

Kinkazu Saionji, portempa respondeculo de la Plenuma Sekretariejo de la Azia-Afrika Verkista Buroo kaj lia edzino;

Anna Louise Strong, progresema verkistino de Usono;

Pridi Banomyong, eksĉefministro de Tajlando;

Kaj amikoj el Laoso.

Kamarado Hie Fuĝi, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Pekino proklamis la komencon de la celebrado. Salvoj ektondradis dum la orkestro laŭte ludis la nacian himnon.

Vicprezidanto Lin Biaŭ faris gravan paroladon en la celebra mitingo. En la nomo de Prezidanto Maŭ, la Centra Komitato de la Partio kaj la registaro de nia lando, li salutis al la laborista klaso, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ruĝgvardianoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj de ĉiuj nacioj en la tuta lando, al la heroa Ĉina Popola Liberiga Armeo, kaj al ĉiuj kiuj amas la socialisman patrolandon kaj al la elmigrintaj ĉinoj. Li esprimis varman bonvenigon al la kamaradoj kaj amikoj venintaj el diversaj landoj de la mondo kaj salutis ilin. En sia parolado, Vicprezidanto Lin resume menciis la grandajn sukcesojn akiritajn de nia granda socialisma patro-

lando en la pasintaj dudek jaroj, sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kaj elmetis batalajn taskojn por la nuna tempo al la armeanoj kaj popolanoj de la tuta lando.

Alte tenante portretojn de Prezidanto Maŭ, ruĝajn flagojn kaj sloganajn tabulojn, la paradantaj revoluciaj amasoj varme ĝojkriadis kaj esprimis, ke ili firme respondos la alvokon de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio. Ili kriis senĉese: “Vivu la granda Ĉina Popola Respubliko!” “Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!” “Vivu, longe vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!” Komenciĝis la grandioza parado. Eskortante la majestan nacian standardon kaj nacian emblemon la falangoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo enmarŝis Tian-anmen-placon. En ordaj kaj imponaj falangoj grandpaŝe marŝis antaŭen laboristoj, kamparanoj, soldatoj, ruĝgvardianoj, ruĝgvardianoj, revoluciaj kadroj, revoluciaj intelektuloj, revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj kaj laborantoj de fizika kulturo, alte tenante portretojn de Prezidanto Maŭ kaj ruĝajn flagojn kaj ĝojkriante, por ricevi revuadon de Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin. La potenca torento de la viglanimaj paradantoj manifestis altan revolucion spiriton kaj altan disciplinecon kaj plene montris, ke sub la kuraĝigo de la spirito de la Naŭa Kongreso de la Partio kaj sub la gvidado de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro, la revoluciaj amasoj de nia lando, armitaj per Maŭzedongpenso kaj harditaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio, estas en senprecedenca revolucia solidareco, vivecplenaj kaj forte aspirantaj al batalakiro de ankoraŭ pli grandaj venkoj.

Marnavigo dependas de stiristo kaj revoluciado dependas de Maŭzedongpenso. Dum sia marŝado ĉirkaŭante gigantajn modelojn de la trezoraj kvar volumoj de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj la “tri popularaj artikoloj”, revoluciaj amasoj de diversaj frontoj varme aklamis, ke la ŝtormo de la Granda Proletara Kultura Revolucio ruinigis la burĝaran komandejon kun la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki ĉe la kapo kaj senprecedence popularigis la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson en nia lando. Ŝultroportante kolosajn tabulojn kun surskribitaj sloganoj kiaj “Bona estas la revolucia komitato”, “Serioze kaj bone konduku batalon, kritikon kaj reformon! Pliapaŝe firmigu la proletaran diktaturon!”, “Energie konduku la revolucion kritikadon! Konduku la socialisman revolucion ĝis la fino!” la parad-

antaj amasoj marŝis grandpaŝe antaŭen kun levitaj kapoj kaj esprimis ĝisfundan revolucion spiriton de nia popolo lukti por pli profunde disvolvi decideme la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, pliapaŝe akceli la ideologian revoluciigon, kaj batali por plene efektiviĝi la diversajn batalajn taskojn elmetitajn de la Naŭa Kongreso de la Partio kaj pliapaŝe firmigi la proletaran diktaturon.

La granda venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio levis novan altan tajdon en la socialisma konstruado de nia lando. Alte tenante kolosajn sloganajn tabulojn kun la surskriboj “Tenu la revolucion, stimulu la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito”, “Streĉu plene la energion kaj strebu forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie” k. t. p., antaŭen marŝis laboristoj de la ĉefurbo, kiuj estas disvolvantaj potencajn socialisman revolucion konkurson. La laborista klaso de nia lando armita per Maŭzedongpenso havas senfinan kreivon. Multkoloraj kaj diversspecaj modeloj montrantaj novajn atingojn en la industriaj branĉoj de metalurgio, maŝinfarado, karbo, fervojo, transporto kaj komunikado, petrolo, kemiaĵoj, ŝpinteksado k. a. aperis unuj sekvante aliajn sur Tian-anmen-placo. Ĉirkaŭante kolosan pentraĵon pri Prezidanto Maŭ faranta kontrolon en kamparo, svingante spikegojn kaj tirante per traktoroj gigantajn ideografiaĵojn signifantajn “bona estas la popola komunumo”, malriĉkamparanoj kaj malsuperaĵ mezkamparanoj venintaj el la antaŭurba plejfronto de aŭtuna rikolto, laŭte kriis “sinpreparu kontraŭ milito, sinpreparu kontraŭ naturaj katastrofoj kaj faru ĉion por la popolo” kaj ĝoje aklamis la sinsekvajn abundajn agrikulturajn rikoltojn de nia lando en la lastaj jaroj. Bele ornamitaj paradaj ĉaroj montrantaj la prosperon de nia merkato kaj stabilecon de la varprezoj de nia lando venis en la placon, kaj vidiĝis giganta slogano sentigante al ni fieron: “Nia lando jam fariĝis socialisma lando havanta nek enlandajn ŝuldojn nek eksterlandajn ŝuldojn”. Ĉiuj ĉi tiuj grandaj venkoj estas akiritaj de nia popolo sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ laŭ la principoj de sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur la propraj fortoj, energia strebado al prosperiĝo kaj penado en malfaciloj. Ĉiuj ĉeestantoj kore ĝojkriis: “Vivu la ĉiamvenka Maŭzedongpenso!” “Vivu la venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ!”

Ascendinte la politikan arenon de batalo, kritiko kaj reformo en la superstruktura sfero, la

laborista klaso de nia lando alportis profundan ŝanĝiĝon al ĉiuj batalfrontoj de la superstruktura sfero. Hodiaŭ, laboristaj kaj PLA-aj propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso kaj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj junaj ruĝgvardianoj, “nudpiedaj kuracistoj” ŝultroportantaj medikament-sakon kun ruĝa kruco kaj lernantoj de “maj-sepaj” porkadraj lernejoj kun suprenfalditaj pantalon-tuboj ricevis revuadon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj esprimis sian komunan firman decidon konduki la socialisman revolucion en la superstruktura sfero ĝis la fino. En la paradaj falangoj de literaturaj kaj artaj laborantoj aperis paradaj ĉaroj pri la naŭ revoluciaj modelaj teatraĵoj “Sagaca Kapto de la Tigra Monto”, “La Ruĝa Signallanterno” k. a. disradiantaj per la brilo de Maŭzedongpenso, kiuj formis imponan bildon ilustrantan la gigantan sloganon “Vivu la venko de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ”.

Laŭte kriante la sloganon “timu nek malfacilojn nek morton”, la paradaj falangoj formitaj de la tera, mara kaj aera fortoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo — la solida apogilo de la proletara diktaturo — impone kaj majeste marŝis en Tiananmen-placon. Ŝultroportante la gigantajn sloganojn “Altigu la singardemon, defendu la patrolandon”, “Estu ĉiam pretaj por ekstermi entrudiĝintajn malamikojn”, “Ni nepre liberigos Tajvan” k. a. kaj alte tenante la brile ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, ili ricevis revuadon de la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin. La popola armeo persone kreita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ kaj rekte komandata de Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin faris grandajn kontribuojn en frakaso de la agresoj de imperiismo, reviziismo kaj reakciularoj kaj en batalo por defendo de la sanktaj limregionoj de la patrolando, en defendo de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj en la laboro de subtenado al industrio, agrokulturo kaj maldekstruloj kaj en milita kontrolo kaj milita-politika trejnado. Gvidate de la kvin gigantaj ideografiaĵoj manskribitaj de Prezidanto Maŭ signifantaj “**Milica Divizio de la Ĉefurbo**”, la plene armitaj gemilicanoj, iuj firme tenante pafilojn en la manoj, aliaj ŝultroportante bazukojn, heroe marŝis kun alta batalspirito. Ŝultroportante gigantajn sloganojn kiaj “Ĉiu el la popolo estas soldato”, “Se la armeo kaj la popolo unuiĝas kiel unu persono, kiu en la mondo povas ilin venki”, “Vivu la venko de popola milito”, ili marŝis tuj post la trupoj de la Popola Liberiga Armeo por ricevi revuadon de la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunba-

talanto Vicprezidanto Lin. Tiam la tutan placon regis entuziasma, ĝoja atmosfero de unuiĝo por batalo inter la armeo kaj la popolo por defendi la patrolandon, kaj plene montris, ke la centmilionaj nombraj armeo kaj popolo de nia lando armitaj per Maŭzedongpenso kaj harditaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio firme decidis, pretas kaj havas sufiĉajn fortojn por ĝisfunde, tute kaj komplete ekstermi per popola milito ĉiujn agresantojn, kiuj aŭdacos entrudiĝi.

Atent-altira giganta slogan-ĉaro veturis en la placon. Sur ĝi surskribiĝis slogano kun granda strategia signifo: “Popoloj de la tuta mondo, unuiĝu kaj oponu kontraŭ agresiva milito lanĉita de iu ajn imperiismo aŭ social-imperiismo, precipe kontraŭ la agresiva milito kun atombomboj kiel armiloj! Se okazos tia milito, la popoloj de la tuta mondo devos ekstermi la agresan militon per revolucia milito, kaj de nun devas sin prepari!” Ĝi esprimis la firman volon de la ĉina popolo kaj la aliaj popoloj de la tuta mondo unuiĝi por batalo kaj nepre frakasi ĉiun ajn agresan militon.

Inter la aliaj, Tian-anmen-pordegon ascendis ankaŭ:

Membroj kaj kandidataj membroj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kiuj estas en Pekino;

Respondeculoj de ĉiuj ĝeneralaj departementoj, la tera, mara kaj aera fortoj kaj branĉoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, la Scienca kaj Teknologia Komisiono por Nacia Defendo, militaj institutoj kaj lernejoj, pekinaj trupoj kaj la Pekina Garnizono kaj respondeculoj de iuj militaj regionoj restantaj en Pekino;

Armeaj reprezentantoj en kaj respondecaj kadroj kaj reprezentantoj de revoluciaj amasoj de ĉiuj departementoj kaj laborgrupoj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio;

Membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso;

Respondeculo de la Plejalta Popola Tribunalo;

Armeaj reprezentantoj en kaj respondecaj kadroj kaj reprezentantoj de revoluciaj amasoj de ĉiuj departementoj de la Ŝtata Konsilantaro;

Membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.

Reprezentantoj de patriotaj ĉinoj en Hongkong kaj Aŭmen kaj de patriotaj ĉinaj elmigrintoj partoprenis la celebran mitingon kaj rigardis la paradon sur la altanoj antaŭ Tian-anmen.

Ankaŭ diverslandaj ambasadoroj al Ĉinio ĉeestis la revuadon de la parado.


Vespere, nia plej amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin ĝoje pasigis la nacifestan vesperon kune kun pli ol kvincent mil armeanoj kaj popolanoj de la ĉefurbo.

En la nacifesta nokto, brilis pompe ĉiuj lampoj sur Tian-anmen-placo. Antaŭ la Monumento de Popolaj Herooj, la giganta slogano en ideografiaĵoj el lampoj kun la signifo "Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn" ruĝe brilis blindige. Sur la placo kaj la larĝaj stratoj ambaŭflanke de ĝi svarmis festantaj amasoj de laboristoj, kamparanoj, soldatoj, ruĝgvardianoj, revoluciaj kadroj kaj

revoluciaj intelektuloj, ĉie sonoritis kantoj, ĉie regis atmosfero de solidareco, venko kaj ĝojo.

Je la oka horo p.m., la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin firmpaŝe suriris Tian-anmen-pordegon. Sur kaj sub la pordego, en kaj ekster la placo, ĉie ĝojkriis la amasoj: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu Prezidanto Maŭ!" En vigla spirito kaj kun rideto, Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin ame mansvingis kaj manklakis en saluto al la reprezentantoj el diversaj lokoj de la lando kaj manpremis kaj interparolis kun kamaradoj kaj amikoj el la kvin kontinentoj de la mondo. Dume, la komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo kaj revoluciaj amasoj formis per ruĝaj floroj kaj lamplumoj la imponan bildon de disradianta ruĝa suno antaŭ la pontoj Ĝinŝujkiaŭ por esprimi sian senliman amon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin rigardis kun granda ĝojo la artfajraĵojn kune kun la vastaj amasoj de armeanoj kaj popolanoj.

La vicaroj de ĉefurbaj laboristoj marŝas tra Tian-anmen-placo kun plena revolucia entuziasmo.



Parolado la Mitingo por Fondiĝo



Vicprezidanto Lin faras paroladon en la mitingo celebranta la 20-an datrevenon de la nacia festo.

samlandanoj, kiuj amas nian socialisman patrolandon! kaj varman bonvenigon kaj saluton al la kamaradoj kaj amikoj venintaj el diversaj landoj en la mondo!

Antaŭvespere de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ solene proklamis al la tuta mondo: **La ĉinoj konsistigantaj kvaronon de la homaro de nun stariĝis.** Tuj post sia naskiĝo, la granda socialisma nova Ĉinio, **same kiel la suno leviĝanta en la oriento, prilumas la tutan teron per sia brila flamo.** De tiam en la historio de nia lando komenciĝis tute nova erao!

Gekamaradoj kaj geamikoj:

Hodiaŭ estas la 20-a datreveno de la fondiĝo de la granda Ĉina Popola Respubliko. En la tempo kiam la popolo de la tuta lando jubile celebras ĉi tiun brilan feston, en la nomo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko, mi adresas saluton al la laborista klaso, la malriĉkamaradoj kaj malsuperaj mezkamaradoj, la ruĝaj gvardianoj, la revoluciaj kadroj kaj la revoluciaj intelektuloj de ĉiuj nacioj de la tuta lando! saluton al la heroo Ĉina Popola Liberiga Armeo! saluton al ĉiuj personoj kaj transmaraj elmigrantaj

En la pasintaj 20 jaroj, sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, sekvante la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ, persistante ĉe la principoj de sendependeco kaj memstareco kaj sinapogo sur siaj propraj fortoj, strebante al prosperiĝo kaj penegge luktante, la tuta ĉina popolo transformis la postiĝintan duonfeŭdan kaj duonkolonian malnovan Ĉinion en progresintan socialisman novan Ĉinion. En nia patrolando okazis mondskuaj ŝanĝiĝoj.

En la 20-jara pasinta batalado ni firmigis la ŝtatpotencon de la proletaro, triumfe

de Vicprezidanto Lin Biaŭ en Celebri la 20-an Datrevenon de la de la Ĉina Popola Respubliko

frakasis renversajn intrigojn kaj subfosajn agadojn de la malamikoj en- kaj eksterlandaj kaj akiris grandajn sukcesojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Samtempe kun la socialisma revolucio sur la ekonomia fronto, ni kondukis la socialisman revolucion ankaŭ sur la politika, ideologia kaj kultura frontoj. La Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ ĝisfunde ruinigis la burĝaran komandon estratan de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj frakasis ilian intrigon por restaŭri kapitalismon. La granda Maŭzedongpenso estas popularigita en senprecedence vasta skalo kaj posedata de centmilionoj da popolanoj, kio ege ŝanĝas la spiritan fizionomion de homoj kaj akcelas senĉesan disvolviĝon de la socialisma afero de nia lando. Nia socialisma patrolando ĉiam pli prosperiĝas kaj kreskas. La popolanoj de ĉiuj nacioj de nia lando estas ankoraŭ pli unuiĝintaj ol iam ajn antaŭe. La proletara diktaturo estas ankoraŭ pli firmigita. La granda socialisma Ĉinio, staranta kiel giganto en la oriento de la mondo, fariĝis potenca politika forto kontraŭ imperiismo kaj reviziismo.

Ĉiuj niaj venkoj estas venkoj de Maŭzedongpenso, estas venkoj de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. La praktiko de la socialisma revolucio de nia lando pruvas, ke la teorio, linio, principoj kaj politikoj pri la daŭra revolucio sub la proletara diktaturo elmetitaj de la gran-

da gvidanto Prezidanto Maŭ formis novajn ekstreme gravajn kontribuojn al la teorio kaj praktiko de Marksismo-Leninismo, kaj elhakis la brilan vojon por firmigi la proletaran diktaturon, preventi la kapitalisman restaŭron kaj konduki la socialisman revolucion ĝis la fino, post kiam la proletaro kaptis la ŝtatpotencon. El siaj longtempa batalo la tutlanda popolo ekkomprenis la veron: strikte sekvi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ signifas venkon.

En la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio kun profunda historia signifo, Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon **“Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn”**, kio ege levis la batalan volon de la tutlanda popolo.

Nun ni devas daŭre alte teni la unuiĝan kaj triumfan standardon de la Naŭa Kongreso de la Partio, ĉiuflanke efektivi la diversajn batalajn taskojn elmetitajn de la Naŭa Kongreso de la Partio kaj efektivi diversajn proletarajn politikojn elmetitajn de Prezidanto Maŭ. Ni devas ankoraŭ pli vaste kaj profunde disvolvi la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj ankoraŭ pli bone fari la laboron de ideologia revoluciigo. Ni devas firme teni la revolucian amasan kritikon, **serioze kaj bone konduki batalon, kritikon kaj reformon**, konduki la Grandan Proletaran Kulturalan Revolucion ĝis la fino, kaj pluapaŝe firmigi la proletaran diktaturon. Ni devas firme plenumi kaj efektivi la

grandan strategian orientilon de Prezidanto Maŭ “**sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo**”, teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito, streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie, kaj levi novan alttajdon en revolucio kaj produkto.

Gekamaradoj, ni devas ankoraŭ pli kompakte unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj plifortigi la centralizitan kaj unuecan gvidon de la Partio. Ni nepre devas, sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ, esti modestaj kaj singardemaj, sed ne fieraj kaj malpaciencaj, daŭre disvolvi viglecplenan revolucionan spiriton de la proletaro, ĉiam konservi la gloran revolucionan tradicion de penega lukto, plene elvolvi la aktivecon kaj kreivon de la vastaj amasoj, por konstrui nian socialisman patrolandon ankoraŭ pli prospera kaj forta, kaj konstrui nian nacidefendan forton ankoraŭ pli potenca.

Dum la pasintaj 20 jaroj, ekstreme profundaj ŝanĝiĝoj okazis en internacia situacio. La revolucia movado de diverslandaj popoloj senprecedence leviĝis, dum la usona imperiismo kaj social-imperiismo falis en senprecedencan izolitecon. Por sin liberigi de la embaraso de malfaciloj en- kaj eksterlandaj, la usona imperiismo kaj social-imperiismo koluzias unu kun la alia kaj konkur-luktas unu kontraŭ la alia, efektiviĝas armad-ekspansion kaj militan preparon kaj cetere freneze intrigas por plani agresan militon kontraŭ nia lando kaj malkaŝe faras nuklean ĉantaĝon kontraŭ nia lando. En la rilatoj inter diversaj landoj, nia lando de ĉiam persistas en la kvin principoj de paca kunekzisto. Nia starpunkto estas: **Se neniu atakos nin, ni atakos nenium; se iu atakos nin, ni certe kontraŭatakos lin.** La tutlanda popolo devas altigi sian singardemon, plifortigi la preparon kontraŭ milito

kaj esti ĉiumomente preta por ekstermi ĉiujn malamikojn, kiuj aŭdacas invadi nian landon. Ni nepre liberigos Tajvan. Ni avertas la usonan imperiismon kaj social-imperiismon: La heroaj ĉina popolo kaj Ĉina Popola Liberiga Armeo armitaj per Maŭzedongpenso estas nevenkeblaj. Se vi nepre volas trudi militon sur la ĉinan popolon, ni do decideme vin akompanos ĝis la fino! Sur la vasta tero de nia lando ĉie estos tombejo por vi!

Ni ĉiam persistas en la proletara internaciismo, firme subtenas la heroan albanan popolon en ĝia batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo; firme subtenas la heroan vjetnaman popolon konduki la nacisavan militon kontraŭ la usona agreso ĝis la fino; firme subtenas la laosan popolon en ĝia justa batalo kontraŭ la invado en Laoson fare de la usona imperiismo kaj tajlanda reakciularo; firme subtenas la palestinan popolon kaj la popolojn de diversaj arabaj landoj en ilia justa batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj cionismo; kaj firme subtenas la revoluciajn batalojn de ĉiuj subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj en la kvin kontinentoj!

Popoloj de la tuta mondo, unuiĝu kaj oponu kontraŭ agresa milito lanĉita de iu ajn imperiismo aŭ social-imperiismo, precipe kontraŭ la agresa milito kun atombomboj kiel armiloj! Se okazos tia milito, la popoloj de la tuta mondo devos ekstermi la agresan militon per revolucia milito, kaj de nun devas sinprepari!

Vivu la granda Ĉina Popola Respubliko!

Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!

Vivu la venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ!

Vivu la ĉiamvenka Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso!

Vivu, vivu, longe vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!

Batalu por Plue Firmigi la Proletaran Diktaturon

— Por celebri la 20-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko

Ĉefartikolo de la ĵurnalo *Renmin Ribao*, gazeto *Hongqi* kaj ĵurnalo *Jiefangjun Bao*

La Ĉina Popola Respubliko persone fondita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ brave antaŭenmarŝis jam 20 jarojn sur la larĝa vojo de socialismo. Hodiaŭ, en la nova alttajo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado aperinta post la Naŭa Kongreso de la Partio, la popolanoj de ĉiuj nacioj de la tuta lando, plenaj de revolucia heroa sento pri venko, varme celebras la grandan kaj brilan feston kaj kune deziras al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ eternan vivon!

Antaŭvespere de la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, Prezidanto Maŭ jam montris: “Tuj kiam la sorto de Ĉinio estas ektenita en la manoj de la popolo mem, Ĉinio, same kiel la suno leviĝanta en la oriento, prilumos la tutan teron per sia brila flamo, rapide forlavos la kotajojn postlasitajn de la reakcia registaro, resanigos la vundojn de milito kaj konstruos tute novan, potencon kaj prosperan popolan respublikon, adekvatan al la nomo.” La disvolviĝo de la historio plene konfirmis tiun marksismleninisman sciencan antaŭvidon de Prezidanto Maŭ.

Prezidanto Maŭ iam emfaze diris: “Por resumi nian sperton kaj ĝin koncentri en unu punkton, ĝi estas la popol-demokratia diktaturo sub la gvido de la laborista klaso

(pere de la Komunista Partio), surbaze de la alianco de laboristoj kaj kamparanoj.” La popola demokratia diktaturo de la Ĉina Popola Respubliko estas la proletara diktaturo. La 20 jaroj de post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko estas 20 jaroj de batalo por firmigi la proletaran diktaturon kaj konstrui novan socialisman Ĉinion. Dum tiu 20-jara batalado, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kun Prezidanto Maŭ kiel ĝia gvidanto, ni firme apogis nin sur la laborista klaso, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj la Popola Liberiga Armeo, unuigis ĉiujn unuigeblajn fortojn, frakasis la agreson, renverson kaj subfosadon de imperiismo estrata de Usono, social-imperiismo kaj eksterlandaj reakciuloj, frakasis la ĝenajn aktivadojn de la bandita kliko de Ĉiang Kajŝek kaj akiris grandajn venkojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, kaj tiel alportis senprecedence grandajn ŝanĝojn al la fizionomio de nia patrulando.

Sub la direktado de Maŭzedongpenso, la proletaro kaj la vastaj popolamasoj, kiuj jam prenis sian sorton en la propraj manoj, uzante la ŝtatan maŝinon de la proletara diktaturo kondukis antaŭen la socialisman revolucion paŝon post paŝo,

disvolvis batalon kontraŭ la burĝaro en ekonomio, politiko, ideologio kaj organizo, kaj senĉese firmigis kaj plivastigis la socialismajn poziciojn.

Sub la instruado de Prezidanto Maŭ, ni disvolvis la revolucionan tradicion de sendependeco kaj memstareco, de sinapogo sur la propraj fortoj, de penema lukto sub malfacilaj kondiĉoj kaj de diligenteo kaj ŝparemo en konstruado de la lando kaj trovis la vojon por multe, rapide, bone kaj ekonomie disvolvi socialismajn industrion, agrikulturon, nacidefendan konstruadon kaj sciencon kaj kulturon. La rapida disvolviĝo de la socialisma produktado alportis la leviĝon de la vivnivelo de la laboranta popolo. Post la plene unuanima penado de la laboranta popolo centmilionojn nombranta, nia patrolando estas jam konstruita en tute novan socialisman landon kun unuapaŝa prospereco. La maluma, povra kaj postĝinta malnova Ĉinio sub la regado de imperiismo kaj ĝiaj lakeoj jam forpasis por ĉiam.

La Granda Proletara Kultura Revolucio, persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ kun partopreno de centmilionoj da popolanoj, ruinigis la burĝaran komandemon estratan de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, frakasis ilian intrigon de restaŭro de la burĝara diktaturo, forpurigis la plenmanon da renegatoj, spiono kaj ĝismorte pentorifuzantaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, enŝteliĝintaj en la Partion, profunde kritikis la burĝaron kaj reviziismon, tiel ke la penso de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo penetriĝis en la korojn de la popolo, kaj la proletara diktaturo estas forte firmigita.

Hodiaŭ, la socialisma Ĉinio jam fariĝis fidinda amiko de la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de ĉiuj landoj en la mondo kaj potenca politika forto kontraŭ imperiismo kaj reviziismo en la nuna epoko.

Ni sentas senkomparan fierecon pro nia granda socialisma patrolando kiu pli prosperas kun ĉiu tago! Ni varme aklamas la grandan venkon de Maŭzedongpenso!

La historia sperto en la lastaj 20 jaroj instruas al ni, ke la fundamenta problemo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado estas la problemo por firmigi la proletaran diktaturon, la problemo de gvidanteco, la **problemo, ĉu la gvidanteco de la Partio kaj la ŝtato estu tenata en la manoj de marksistoj aŭ de reviziistoj.** La firmigo de la proletara diktaturo estas baza garantio por tio ke nia lando iros la socialisman vojon. En la Unua Plena Sesio de la Naŭa Centra Komitato de la Partio, Prezidanto Maŭ montris: **“Unuiĝu por unu celo, nome, firmigi la proletaran diktaturon, kio devas esti efektivigita en ĉiu fabriko, vilaĝo, institucio kaj lernejo.”** Tio estas granda alvoko farita de Prezidanto Maŭ post profunda resumo de la historiaj spertoj en la lastaj 20 jaroj. Nia tasko estas daŭre efektivigi ĉi tiun alvokon de Prezidanto Maŭ kaj plue firmigi la proletaran diktaturon en politiko, ideologio, ekonomio kaj organizo.

Por plue firmigi la proletaran diktaturon, ni devas serioze zorgi por plua firmigo kaj perfektigo de diversnivela revoluciaj komitatoj de triflanka kombiniĝo. La diversnivela revoluciaj komitatoj kaj ĉiuj kadroj devas konservadi intimajn ligojn kun la amasoj, fidi al ili, sin apogi sur ili kaj disvolvi ilian revolucionan kreivan spiriton. Ĉiuj revoluciaj kadroj devas dividi dolĉon kaj amaron kun la popolamasoj, tutkore kaj tutanime servi al la popolo, persisti en partopreno de kolektiva produkta laboro, bone kulturi tipojn kaj sin liberigi de burokratismo kaj aliaj tendencoj de disiĝo de la amasoj. Ni devas fari profundan kaj konstantan ideologian kaj politikan laboron inter la amasoj kaj korekti erarajn tendencojn per rezonado kaj konvena kritiko por plifortigi la unuiĝon. Rilate al klasaj malamikoj en- kaj ekster-landaj kaj la plenmano da malbonaj

elementoj miksiĝintaj en la amasoj, ni devas altigi nian singardemon. Se nur ni sekvas la instruojn de Prezidanto Maŭ, ĉiuflanke praktikas la politikojn de la Partio kaj laboras atenteme, ni certe povas, sub la gvido de la Partio, mobilizi ĉiujn pozitivajn faktorojn kaj unuigi la plejparton de homoj por ege firmigi la diktaturon de la proletaro kaj vasta laboranta popolo super la plenmano da klasaj malamikoj kaj ege rapidigi la socialisman konstruadon de nia lando.

Por plue firmigi la proletaran diktaturon, ni devas pluapŝe disvolvi la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, firme teni revolucion amasan kritikon en la laboroj de batalo, kritiko kaj reformo kaj konduki ĝis la fino la socialisman revolucion en la kampo de superstrukturo. Gvidantaj kamaradoj ĉe ĉiuj niveloj devas serioze studi kaj efektivi la doktrinon de Prezidanto Maŭ pri ĝusta traktado de la du specoj de kontraŭdiroj malsamaj en naturo kaj devas resumi kaj firme teni en la memoro la riĉan sperton en traktado de la du specoj de kontraŭdiroj malsamaj en naturo dum la Granda Proletara Kultura Revolucio. La Granda Proletara Kultura Revolucio donis pezan baton al la ideologioj de ĉiuj ekspluataj klasoj, sed ni devas vidi, ke la batalo inter la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo trairas la tutan historian periodon de la proletara diktaturo. Utiligante ĉiumomente sian influon en la ideologia sfero kaj sinturnante al diversaj taktikoj, la renversitaj ekspluataj klasoj daŭre disvastigas sian venenon, koruptas niajn kadrojn kaj klopodas gajni al si la amasojn en la batalo kun la proletaro. Trafinte malvenkon politike, la plenmano da klasaj malamikoj ankoraŭ provos subfosi la socialisman fundamenton ekonomie. Tiu batalo estas longdaŭra. Ni devas armi la vastajn amasojn per Maŭzedongpenso, profunde kaj longdaŭre disvolvi revolucion amasan kritikon, serioze kaj bone konduki la klasan batalon tiel en la sferoj de politiko,

ideologio kaj kulturo, kiel en la sfero de ekonomio. Kaj en tiu batalo, ni devas plue firmigi la gvidantecon de la proletaro, plue firmigi kaj disvolvi la socialisman posedsistemon, plue disvolvi la socialismajn produktajn fortojn, plene elvolvi la kreivon kaj saĝon de la popolamasoj, kaj tiel impulsi la industrian kaj agrikulturan produktadon kaj sciencan kaj teknikan al ankoraŭ pli rapida disvolviĝo.

La proletara diktaturo estas efektivigata pere de la gvidado de la Komunista Partio. La tuta Partio, la tuta armeo kaj la tutlandaj popolamasoj devas kompakte unuigi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicedstro, **unuigi konon, unuigi politikon, unuigi planadon, unuigi komandon kaj unuigi agadon** per Maŭzedongpenso. Ni nepre devas serioze kaj bone fari la laboron de ordigo kaj konstruado de la Partio. La kompartianoj devas stari sur la starpunkto de la partia spirito de la proletaro kaj de la partia politiko kaj devas komplete liberigi sin de la eraraj ideoj kaj laborstilo, kiuj estas kontraŭ la intereso de la proletaro kaj la vastaj popolamasoj; alie ili ne povas meriti la gloran titolon de kompartiano. Ĉiuj revoluciaj amasoj devas plifortigi sian koncepton pri la Partio, akcepti la gvidon de la Partio, ame zorgi kaj subteni la revoluciajn komitatojn, subteni la Popolan Liberigan Armeon kaj fari novajn kontribuojn en la firmigo de la proletara diktaturo kaj plifortigo de la socialisma konstruado.

Traktante pri la proletara diktaturo, Prezidanto Maŭ montris: **“La dua funkcio de la diktaturo estas defendi nian landon kontraŭ renversa agado kaj ebla agreso fare de la eksteraj malamikoj.”**

La usona imperiismo, social-imperiismo kaj iliaj lakeoj havis sennombrajn sonĝojn pri renverso de la proletara diktaturo de nia lando. Iliaj du kontraŭrevoluciaj taktikoj de armita agreso kaj “paca evoluo”,

ambaŭ estas frakasitaj de la fera pugno de la granda ĉina popolo kaj Ĉina Popola Liberiga Armeo. Por sinliberigi de [malfaciloj en- kaj ekster-landaj, la usona imperiismo kaj social-imperiismo, kiuj estas en senelirejo, nun intensigas sian koluzion kaj vane planas agresajn militojn kontraŭ Ĉinio, kaj ili eĉ disvastigas diversajn onidirojn por fari nuklean ĉantaĝon kontraŭ Ĉinio. Ni sciigas vin malkaŝe: Ni jam antaŭlonge travidis tiun vian artifikon, ĝi estas tute nenio por ni! Vi vane provas instigi la postrestantajn kontraŭrevoluciajn fortojn restaŭri kapitalismon kaj esperas, ke Liu Ŝaŭki kaj lia bando da kontraŭrevoluciuloj denove sursceniĝos; tio estas simple sonĝo dum la taglumo kaj plena deliro. Via vana provado de organizo de ribeloj en niaj landlimaj areoj nur ebligas al niaj diversnaciaj revoluciaj popolanoj pluapaŝe klarigi sian vidon, elimini spionojn kaj ĝisfunde ekstermi la ribelintajn banditojn. Per via vana provo de startigo de armita agreso, vi nur ĵetos vin mem en la reton de granda, justa kaj kontraŭagresa popola milito, permesantan nenian elsavon. Via nuklea ĉantaĝo neniom povos timigi la nevenkeblan ĉinan popolon; ĝi nur frakasos viajn jam sufiĉe malfortajn nervojn, servos por instigi la popolojn de viaj propraj landoj kaj tiujn de la tuta mondo kondamni kaj oponi vin, kaj bruligos vin en la flamoj de la indigno de la revoluciaj popoloj. Eĉ se vi turnos vin al ĉiuj perversaj rimedoj, tio estos nenio alia ol levi ŝtonon por faligi ĝin sur viajn proprajn piedojn kaj ege rapidigos vian propran pereon. Estas neniu alia elirvojo por vi.

Armita per Maŭzedongpenso kaj hardita en la Granda Proletara Kultura Revolucio, la ĉina popolo estas nevenkebla. La Ĉina Popola Liberiga Armeo persone fondita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ kaj rekte komandata de Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin, estas ĉie senrivala. “Se neniu atakos nin, ni atakos neniun; se iu atakos nin, ni certe kontraŭatakos lin.”

Laŭ nia propra deziro, eĉ unu tagon ni ne volas militi. Nia eksterlanda politiko estas konstanta. Ni de ĉiam opinias, ke la internaj aferoj de ĉiu lando devas esti solvataj de ĝia popolo mem. Ni pledas por solvi landlimajn konfliktojn inter la koncernaj landoj per la rimedo de traktado. Tamen, se iu ajn imperiismo aŭ social-imperiismo nepre altrudos militon sur la ĉinan popolon, ni ilin akompanos en la milito ĝis la fino kaj **ekstermos firme, ĝisfunde, tute kaj komplete** ĉiujn agresantojn kiuj aŭdacos nin invadi.

La tuta popolo de Ĉinio, unuiĝu kaj respondu al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, **teni la revolucion, stimuli la produktan, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito**, konservu altan revolucionan singardemon ĉiumomente, sin gardu kontraŭ surprizatakoj de la malamiko, firme gardu la laborpostenojn, kaj estu pretaj por firme defendi la sanktajn landlimajn regionojn de nia granda patrolando kaj komplete frakasi la agresajn intrigojn de la usona imperiismo kaj social-imperiismo! Ni nepre liberigos la teritorion de nia patrolando Tajvan!

La popoloj de la tuta mondo unuiĝu kaj oponu kontraŭ la agresa milito lanĉita de iu ajn imperiismo aŭ social-imperiismo, precipe kontraŭ la agresa milito kun atombomboj kiel armiloj! Se okazos tia milito, la popoloj de la tuta mondo devos ekstermi la agresan militon per revolucia milito, kaj de nun devas sinprepari!

Vivu la granda unuiĝo de la tutlanda popolo!

Vivu la granda unuiĝo de la tutmonda popolo!

Vivu la proletara diktaturo!

Vivu la ĉiamvenka Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso!

Vivu, vivu kaj longe vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!

Kamarado Lin Biaŭ

en la Periodo de la Liberiga

Milito en Nordoriento

(Daŭrigo)

SAGA KAJ DECIDEMA KOMANDO

Prezidanto Maŭ diris: “La scenejo de agado por la komandantoj de milito devas esti konstruita sur la objektivaj eblecoj; tamen sur tiu scenejo ili povas direkti la prezentadon de multaj teatraĵoj plenaj de sono kaj koloro, potenco kaj imponeco.” Komandanto Lin estas ĝuste tia komandanto. Sekvante la instrukciojn de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, li elmontris en batalado kontraŭ la potencaj malamikoj siajn elstaran kapablon direkti la disvolvon de milito kaj lertan arton en komando de milito.

Pri tio la kampanjo de Liaŭhi-Ŝenjang, kiu havis decidan signifon por la liberiĝo de Nordoriento, estas la plej viva pruvo. Post la somera kaj aŭtuna ofensivoj lanĉitaj de nia armeo en 1947 kaj potencaj ofensivoj en vintro de 1947 kaj printempo de 1948, la trupoj de Ĉiang Kajŝek devigite retiriĝis al kelkaj grandaj urboj kiaj Ĉangĉun, Ŝenjang kaj Ĝingŝoŭ kaj al ĉirkaŭ dek malgrandaj urboj. En Ĉangĉun troviĝis 90,000 gardantaj malamikoj, en Ĝingŝoŭ estis 100,000 kaj en Ŝenjang, la nesto de la malamikoj, troviĝis pli ol 200,000. Tiam la ĉefa forto de nia armeo koncentriĝis sur la linio inter Ĉangĉun kaj Siping. Ni alfrontis la problemon kiel konduki batalon en la plua paŝo.

Laŭ ordinara taktika konsidero, pli oportune estis unue ataki Ĉangĉun, ĉar la ĉefa forto de nia armeo estis proksime de ĝi, dum la malamikoj en Ĉangĉun foruzis sian tutan provizon de municio kaj greno kaj perdis batalvolon post longtempa sieĝo fare de nia armeo, tial ni estis certaj pri venko en atako al la urbo. Sed kiel estos, se unue oni atakos Ĝingŝoŭ? Tiam plejparto de niaj kamaradoj opiniis, ke por tion fari, la ĉefa forto de nia armeo devos fari longan marŝon de mil lioj suden, dum la malamikoj bezonos nur atendi ripozante nian laciĝintan armeon, tial ni ne certe venkos; kaj post la formariĝo de nia ĉefa forto malfortiĝos nia postfronto kaj la malamikoj de Ĉangĉun kaj Ŝenjang eble trarompas la sieĝon; samtempe nia armeo sin trovos en mezparto de la defenda linio de la malamikoj, kaj eble ricevos atakon de la malamikoj en kaj ekster Ŝanhajguan-pasejo. Tial unue ataki Ĝingŝoŭ ne nur estas multe pli malfacile kaj komplike ol unue ataki Ĉangĉun sed ankaŭ estas je tridekprocenta risko. Tamen, se ni kaptos Ĝingŝoŭ, ni povos meti la malamikojn en pereon kaj disfaligi la tutan armeon de Ĉiang Kajŝek en Nordoriento kaj havos la eblecon ekstermi la tutan malamikon kaj liberigi la tutan Nordorienton.

Kian decidon faris la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ pri tiu ŝlosila kampanjo

kiu koncernis la militan situacion de la tuta Nord-oriento? Kaj kiel ĝin direktis Komandanto Lin? La Centra Komitato de la Partio, Prezidanto Maŭ kaj Komandanto Lin profunde sciis, ke la batalforto de la pereontaj trupoj de Ĉiang Kaj-ŝek ankoraŭ pli malgrandiĝis ol antaŭe, kaj ke per nia forto ni tute povos unuspire kapti Ginĝoŭ, kaj per malmultnombraj trupoj por retenado ni ankaŭ povos malhelpi la malamikojn de Ĉangĉun kaj Ŝenjang trarompri la sieĝon kaj obstrukci help-trupojn de la malamikoj el sudo de Ŝanhajguan-pasejo. Ŝajnis, ke unue ataki Ginĝoŭ estas afero riska kaj peniga, sed fakte, ni estis certaj pri venko kaj la afero estis riska sed ne danĝera. Tial laŭ la ĝenerala strategia plano kaj konkretaj instrukcioj de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, Komandanto Lin decidis koncentri la ĉefan forton por unue ataki Ginĝoŭ. Jen komenciĝis en la 1-a de oktobro de 1948 la kampanjo de Liaŭhi-Ŝenjang kun historia signifo.

La kampanjo de Liaŭhi-Ŝenjang estas bona modelo en la milita historio de la ĉina revolucio kaj ankaŭ unu el la mirakloj en la milita historio de la mondo. La kampanjo de Liaŭhi-Ŝenjang konsistis el tri periodoj: la unua estis periodo de atako al la forte defendata Ginĝoŭ; la dua, periodo de decida operacio en Liaŭhi; kaj la tria, periodo de kupto de Ŝenjang. La atako kontraŭ la forte defendata Ginĝoŭ komenciĝis en la 14-a de oktobro de 1948. Post duonmonata intensa batalado ni liberigis Ginĝoŭ kaj plene ekstermis pli ol 120,000 gardantajn malamikojn. Rezulte de tio, ni kunpremis la gorĝon de Nordoriento kaj plene obstrukcis la vojon de la malamiko kondukantan al la sudo de Ŝanhajguan-pasejo, tiel ke la kelkcent mil malamikoj en Ĉangĉun kaj Ŝenjang fariĝis testudoj en vazo. La trupoj de Zeng Zeŝeng ribelis, Ĝeng Dong-guo senkondiĉe kapitulacis kaj tuj post tio Ĉangĉun estis liberigita; en la granda venko de Liaŭhi, la pli ol cent mil personoj de la korpuso de Liaŭ Jaŭhiang estis tute ekstermitaj. Postkurante en venko, ni kaptis Ŝenjang kun impeto de lavango. Kaj nur 17 tagojn post la liberiĝo de Ginĝoŭ, jam komplete liberiĝis la tuta Nordoriento. Kiam intense iris la batalo de Ginĝoŭ, Ĉiang Kajŝek veturadis per aviadilo, kiel formiko en varma kaldrono, inter Bejping, Tiangin, Ŝenjang, Ginĝoŭ kaj Dagukoŭ, kaj inter Kinhuangdaŭ kaj Huludaŭ, por persone direkti la batalon. Laŭdire, kiam nia armeo liberigis Ginĝoŭ, tiu fripono sputis sangon pro terura maltrankviliĝo. Tio pruvis, ke atakante unue Ginĝoŭ per koncentritaj fortoj laŭ la instrukcio de la Centra Komitato de la Partio

kaj Prezidanto Maŭ, Komandanto Lin ĝuste batis sur la mortigan punkton de la malamikoj kaj tiu batalo estis ŝlosila batalo por rapidigi la liberigon de Nordoriento.

Estis tute ne hazarde, ke Komandanto Lin ĉiam povis venki en militado. Lia plej elstara karakterizaĵo estas koni la malamikon kaj koni sin mem. Ĉiuj scias la diron “konu la malamikon kaj konu vin mem kaj vi povas fari cent batalojn sen malsukceso”, sed tre malfacile estas vere agi laŭ tiuj vortoj! Tio ĝuste estas la ĉefa dividlinio inter komandantoj prudentaj kaj banalaj. Ĝuste pro tio, ke Komandanto Lin konis kaj la malamikojn kaj sin mem, li povis konvene direkti la batalojn. Li ĉiam havis detalan konon pri la malamikoj. Li tiel bone konis la staton de la malamiko, ke li eĉ sciis la agadon de ĝiaj batalionoj. Post la granda venko de Gongĝutun, mi iris al la stabo en Harbin por partopreni kunvenon. Komandanto Lin diris al mi: “Laŭ raporto de fronta komandanto, fuĝis bataliono de la malamikoj kiu gardas nun en Hegiajoŭfang de Faku-gubernio. La 28-a divizio de la deka kolono estas proksime de la bataliono, do ĝi ekstermu la lastan. Laŭ mia kalkulo ni ne bezonos multe da tempo por tio. Kiel vi opinias?” Kaj li iris antaŭ la mapon kaj montris sur ĝi la precizan lokon de tiu bataliono kaj tuj faris ordonon ekstermi tiun bandon da malamikoj. En la sekvanta tago, informo pri venko de la 28-a divizio jam alsendiĝis de la loko mil liojn malproksima de la stabo. Tio estis nur ordinara ekzemplo. Fakte, Komandanto Lin ĉiam estas tiel atentema. Li klare sciis, kie sin trovas malamikoj, kiom ili estas, kia estas ilia batalforto, kia estas ilia intenco kaj ankaŭ la grandajn aŭ malgrandajn montojn, riverojn, terformon kaj lokajn kutimojn ktp. Antaŭ ĉiu milita agado, li ofte donis tiajn detalajn kaj precizajn informojn rekte al divizioj, kio multe faciligis ilian aktivadon.

Komandanto Lin tre atentis pri enketado kaj esplorado, profunda kono de la stato de la malamiko kaj decidis sian agadon laŭ tiu kono. Li ofte diris: “Ni devas firme oponi kontraŭ farado de batalo subjektiva, burokratisma kaj senprudenta. Se ni batalas nur laŭ nia subjektiva volo, ni certe rompos al ni la kapon kaj certe malvenkos.” Sed aldone al tio li faris detalan klarigon: “Oni faras batalon ĉiam kun tridekprocenta risko, ordinare, se oni havas sepdek procentojn da certeco pri venko plus subjektiva klopodo, ili povas fari batalon kaj akiri venkon en ĝi. Se oni faras batalon nur kiam oni havas cent procentojn da certeco pri venko, tiam ili ne povas fari multajn batalojn.


Tio estas sinjora maniero en batalado kaj nepre perdigas batalŝancojn.” Tio estas materiisma dialektiko de milita komando. Akceptinte tiun gvidan penson, ĝenerale oni povas venki; alie, oni aŭ trafas malvenkojn aŭ perdas batalŝancojn.

Komandanto Lin plej bone konis siajn trupojn: li konis la voĉojn kaj vizaĝesprimojn de la kadroj, konis la militan kaj politikan staton de la trupoj kaj iliajn superecojn kaj mankojn kaj sciis kiom pezan taskon ili povas plenumi. Li fidis siajn trupojn kaj ankaŭ la trupoj sian komandanton. Inter la batalantoj cirkulis jena diro: “Kien montras Komandanto Lin, tien ni atakas; kaj efektiviĝi la ordonojn de Komandanto Lin ja signifas venkon.” Kelkfoje akceptante taskon, ni klare sciis, ke ni devas alfronti grandajn malfacilojn kaj danĝerojn, sed la memfido pri certa venko kuraĝigis nin sentime marŝi antaŭen. Post la liberiĝo de Ĝinĝoŭ, Ĉiang Kajŝek persone flugis al Ŝenjang por komandi la kvin armeojn de la korpuso de Liaŭ Jaŭhiang kun sume pli ol cent mil personoj ĉe Ŝenjang marŝi okcidenten, vane intencante reokupi Ĝinĝoŭ kaj se ili malsukcesos en tio, ili fuĝos tra Ĵingkoŭ al la sudo de Ŝanhajguan-pasejo per mara vojo. La korpuso de Liaŭ Jaŭhiang estis propra parto de la armeo de Ĉiang Kajŝek, kaj la Nova Unua Armeo kaj Nova Sesa Armeo en ĝi ja estis du el la t. n. “kvin grandaj ĉefaj fortoj”. Evidente, ekstermi tiun parton de la malamiko havis grandegan signifon. Tiam nia ĉefa forto ankoraŭ koncentriĝis en la regiono de Ĝinĝoŭ. Por preventi la fuĝon de la malamikoj al Ĵingkoŭ kaj plue al la sudo de Ŝanhajguan-pasejo, estis nepre necese bari la malamikojn ĉe Ŝenjang. Komandanto Lin asignis la taskon bari la malamikojn al nia Deko Kolono (dum kampanjo de Ĝinĝoŭ, ni estis ĉe Fangŝan-urbeto de Hinlitun, proksime de Ŝengjang, kaj per movada defensiva batalo baris helpajn trupojn de la malamiko el Ŝenjang). Je la 20-a de oktobro, ni ricevis la telegramon de Komandanto Lin, kiu ordonis nian kolonon rapidi en la sama nokto de Bejĝen revene al la regionoj de Hejŝan kaj Dahuŝan kaj tuj konstrui fortikaĵojn, montrante, ke tiun lokon nepre trauros la korpuso de Liaŭ Jaŭhiang. Li ordonis, ke ni firme gardu nian pozicion, ne lasu la malamikojn antaŭenmarŝi eĉ je unu paŝo, dirante ke, ni ebligas la ĉefajn trupojn tute ekstermi la malamikojn se ni sukcesos nur gardi tri tagojn. Ĝuste estis kiel antaŭkalkulite de Komandanto Lin, apenaŭ ni atingis la pozicion, je la 24-a, la korpuso de Liaŭ Jaŭhiang jam alŝvarmis kiel akridaro kaj faris furiozan sturmon al nia pozicio sub la akompano de aviadiloj, tankoj kaj pezaj kanonoj. Nia kolono havis nur 40,000

personojn, kaj post movada defendado ni tuj turnis nin en fiksan defendadon, tial mankis al ni tempo por ripozi. Tiam jam estis frosta vintro, tamen nia trupo ne havis vatitajn vestojn, dum la 100,000 malamikoj armitaj per usonaj ekipaĵoj estis ferocaj fuĝantoj kiuj volis preni vojon por sin savi. Tial la intenseco de la batalo estas imagebla. Nia pozicio estis foj-refoje perdita kaj regajnitita. Niaj batalantoj luktis kun braveco “unu kontraŭ cent malamikoj” kaj mortigis tiel multe da ili, ke iliaj kadavroj kuŝis ĉie sur la kampoj kaj sango fluis kvazaŭ rivero, kaj ankoraŭ firme staris nia pozicio. Ni havis firman kredon: se Komandanto Lin diris, ke la malamikoj estos ekstermitaj en tri tagoj, do la malamikoj certe ne vivos ĝis la kvara tago; se per unu kolono ni ne povas ĝin formanĝi, ni povas firme reteni ĝin. En la 25-a, kiam la batalo plej ardis, ni ricevis la duan telegramon senditan de Komandanto Lin, politika komisaro Luo Ĵonghuan kaj stabestro Liu Jaloŭ, kiu laŭdis la bravecon de nia trupo kaj donis instrukcion, ke ni persistu plue unu tagon. Post komuniko de la telegramo de Komandanto Lin al la trupoj pli altiĝis ilia batalspirito, kaj la batalantoj konkure esprimis: “Ni nepre plenumos la taskon asignitan de Komandanto Lin, kaj nepre ne lasos Liaŭ Jaŭhiang forfuĝi.” Tiel ju pli ili batalis, des pli ili entuziasmiĝis. Kaj kiel atendite, matene de la 26-a la ĉeffortoj de niaj trupoj ĝustatempe alrapidis kaj dense sieĝis la malamikojn. Je la mateno de la 26-a disvolviĝis grandskala eksterma kampanjo kaj pli ol 100,000 personoj de Liaŭ Jaŭhiang ĉiuj estis ekstermitaj. Post la finiĝo de la batalo, Komandanto Lin, politika komisaro Luo Ĵonghuan kaj stabestro Liu Jaloŭ sendis telegramon por laŭdi la sukceson de la Deko Kolono en barado de la malamikoj. Ili opiniis, ke nia batalo ludis gravan rolon en ekstermo de la tuta korpuso de Liaŭ Jaŭhiang. Poste ni aŭdis, ke kiam Komandanto Lin decidis, ke la Deko Kolono baru la korpuson de Liaŭ Jaŭhiang en Hejŝan-regiono, iuj kamaradoj diris maltrankvile: “Por tio la Deko Kolono eble estos frakasita!” Sed Komandanto Lin diris: “Ne, la Deko Kolono kompetentos por tio.” Kiom profundan enhavon liaj malmultaj vortoj entenis! Kiel bone Komandanto Lin konis sian trupon kaj kiel li kredis sian trupon! Li diris: “La Deko Kolono kompetentos por tio.” Kaj la batalantoj de la Deko Kolono diris: “Ni nepre ne lasos Liaŭ Jaŭhiang forfuĝi.” La komandanto kaj batalantoj havis komunan konon kaj komunan lingvon. Kompreneble, tia trupo povas renkonti neniun rivalon kaj estas neniam venkebla.

(*Daŭrigota*)

LA RUĜA STANDARDO DE ŜAŬŜAN FLIRTAS EN LA VENTO



La antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ. Tie en 1925 Prezidanto Maŭ persone fondis la filion de la Komunista Partio de Ĉinio en Ŝaŭŝan.

ŜAŬŜAN estas la hejmloko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Antaŭ 44 jaroj, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ fondis ĉi tie la plej fruan kaj plej firman partian filion en la ĉina kamparo — la filio de la Komunista Partio de Ĉinio en Ŝaŭŝan. En la pasintaj 44 jaroj, la partia filio de Ŝaŭŝan strikte sekvis Prezidanton Maŭ kaj gvidis la popolanojn de Ŝaŭŝan konduki longdaŭrajn kaj senkompare penigajn batalojn kontraŭ la kuomintanga reakciularo, la japana imperiismo kaj la burĝara komandejo kun Liu Ŝaŭki kiel la ĉefo, tiel ke tiu ĉi ruĝa standardo propramane starigita de Prezidanto Maŭ flirtas super la majesta Ŝaŭŝan-montpinto en la uragano de klasa batalo.

BATALI POR LA REVOLUCIO UNUJ SEKVANTE ALIAJN

En la tagoj antaŭ la Printempa Festo de 1925, en Ŝaŭŝan-valo dense flirtis neĝflokaj, kaj la suferplenaj popolanoj de Ŝaŭŝan dronis en turmentado de malsato kaj frosto. Ĝuste tiam, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ speciale revenis de Ŝanhajo al sia hejmloko disvolvi kampanaran movadon, por mobilizi milionojn da kampanaroj partopreni en la revolucia batalo, realigi gvidon de la proletaro al la kampanaro, starigi fortikan laborist-kampanaran aliancon kaj levi tutlandan altan tajdon de batalo kontraŭ imperiismo kaj

feŭdismo. La alveno de Prezidanto Maŭ tre forte kuraĝigis la suferantajn popolanojn de Ŝaŭŝan.

Tuj post sia hejmvreveno, Prezidanto Maŭ vizitis malriĉulojn kaj zorgeme demandis pri iliaj suferoj, por profunde mobilizi la amasojn; li laboris streĉe tagnokte eĉ forgesante dormon kaj manĝon por propagandi la revolucion veron. Dank' al peniga kaj zorgema laboro politika kaj ideologia, li rapide elkulturis aron da kernaj laborantoj por kamparana movado, fondis la unuan kamparanan asocion — Venĝa Asocio, la unuan kurson de kamparana movado en Ĉinio — Kamparana Vesperlernejo kaj persone fondis la partian filion de la Komunista Partio de Ĉinio en Ŝaŭŝan.

Ekde tiam, la heroaj popolanoj de Ŝaŭŝan, sub la gvido de la partia filio, organizis “sindefendan taĉmenton de kamparanoj”, “asocion de virinoj”, “ligon de infanoj” kaj aliajn revolucionajn organizojn. Poste, aktive respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ **“faligu la armitajn fortojn de la bienuloj kaj kreu armitajn fortojn de la kamparanoj”**, la filio gvidis la ŝaŭŝan-ajn popolanojn frakasi, per lancoj kaj bastonoj, la armitajn fortojn de la bienuloj kaj starigi kamparanan regpotencon.

Ĝuste kiam la kamparana movado vigle disvolviĝis, Ĉiang Kajŝek perfidis la revolucion en 1927 kaj faris maloftan masakron kontraŭ la komunistoj kaj revolucionaj amasoj. La unuaj elstaraj partianoj de la filio de Ŝaŭŝan unuj post aliaj falis en sango kaj martiriĝis brave. La sango de la martiroj ruĝigis la akvon kaj teron de Ŝaŭŝan. . .

Sed, alfrontante la kruelan masakron de la malamikoj, la heroaj popolanoj de Ŝaŭŝan estis nek timigitaj nek konkeritaj. Ili firme kredis pri tio, ke nepre sukcesos la granda revolucia afero gvidata de Prezidanto Maŭ. Ili **“forviŝis la sangmakulojn de sur siaj korpoj, enterigis la kadavrojn de siaj kamaradoj kaj denove daŭrigis la batalon”**. La filia sekretario Maŭ Fuhjuan tage studis kun siaj kamaradoj en kaverno la batalan situacion kaj kontraŭrimedon, kaj nokte vizitis malriĉulajn kabanojn por organizi la amasojn kaj persisti en batalo kontraŭ la malamikoj. La filio ankaŭ sendis aron da firmaj kamaradoj por partopreni la Aŭtunrikoltan Ribelon persone gvidatan de Prezidanto Maŭ. Aparte dum la furioza Kontraŭjapana Rezistmilito, la partia filio gvidis la popolanojn de Ŝaŭŝan fondi sian partizanan taĉmenton por batali kontraŭ la japanaj rabistoj kaj defendis Ŝaŭŝan, tiel ke ĝi evitis tretadon fare de la agresantoj. Dum la intensa Liberiga Milito,

ili disvolvis armitan batalon en la postfronto de la malamikoj kaj faris multajn atakojn kontraŭ ili, donante efikan subtenon al la sudenmarŝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.


En la longdaŭra revolucia batalo, la heroaj popolanoj de Ŝaŭŝan defendis, per sango kaj vivoj, la revolucion semon persone semitan de Prezidanto Maŭ kaj venigis la tagiĝon per bataloj!

FIRME IRI LA SOCIALISMAN VOJON

Post la Liberigo de la tuta lando, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **“disvolu la revolucion tradicion kaj akiru pli grandan gloron”**, la partia filio de Ŝaŭŝan gvidis la popolanojn heroe marŝi sur la socialisma vojo kaj kondukis firman batalon kontraŭ la malamikoj sen armiloj.

En ĉiuj laboroj ili ĉiam strikte sekvas Prezidanton Maŭ kaj iras antaŭ la aliaj. En 1951, ili fondis la plej fruajn interhelpajn grupojn en la regiono de Hiangtan. En 1953, ili fondis la Ŝaŭŝan-an Elementan Agrikulturan Kooperativon. En 1955, ili decidis turni la elementan agrikulturan kooperativon en la altgradan. Sed la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Hunan-provinco estis timigitaj de la bolanta socialisma alttajo. Ili kalumnie nomis tion “riska faro”; pretekstante ke “la altgradaj kooperativoj en la tuta provinco jam atingis la difinitan sumon”, ili malpermesis al ili turni la Ŝaŭŝan-an Elementan Agrikulturan Kooperativon en la altgradan, intencante strangoli la aktivecon de la ŝaŭŝan-aj popolanoj iri la socialisman vojon.

La partia filio de Ŝaŭŝan, kiu posedas riĉajn spertojn de klasa batalo, travidis la intrigon de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj ne kredis ilian babilaĉon. Ĝi gvidis ĉiujn partianojn kaj kooperativanojn ripetade studi la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ **“Organiziĝu”** kaj retrorigardi la superecon de organiziĝo. Ju pli ili studis, des pli klariĝis la direkto kaj des pli altiĝis la entuziasmo. La vastaj amasoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj firme diris: “La vojo montrita de Prezidanto Maŭ kondukas al riĉiĝo kaj al kolektiva feliĉo, ni nepre persiste iros tiun vojon!” La entuziasmo de la amasoj donis grandan stimulon al la kamaradoj de la partia filio. La filio unuflanke raportis al Prezidanto Maŭ pri la prospera disvolviĝo de interhelpado kaj kooperigo pere de la tiutempa



La partia filio de Ŝaŭŝan okazigas filian kunvenon kaj serioze resumas sperton pri la batalo inter la du linioj.

distrikta registaro, kaj aliflanke aktive faris preparan laboron por turni la elementan kooperativon en la altgradan. Ili firme kredis, ke Prezidanto Maŭ certe subtenos ilian revolucionan faron.

Post nelonge, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone skribis al ili leteron el Pekino. Prezidanto Maŭ multe laŭdis ilian aktivecon por iri la socialisman vojon kaj instigis ilin daŭrigi sian penadon. Tiamaniere, venke naskiĝis la Ŝaŭŝan-a Altgrada Agrikultura Kooperativo! La popolo de Ŝaŭŝan faris grandan paŝon sur la larĝa socialisma vojo.

La aktiveco de la partia filio kaj popolo de Ŝaŭŝan por iri la socialisman vojon renkontis frenezan oponon de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Hunan. Ili sendis laborgrupon al Ŝaŭŝan kun la intrigo tie restaŭri kapitalismon kaj premfaligi la partian filion — firman batalan bastionon. Kulpigante iujn partianojn pri “malobeo al gvidado”, ili ekspartianigis ilin. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ, ke “**komunistoj devas esti ĉiam pretaj persisti ĉe la vero**”, la filio de Ŝaŭŝan-brigado faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Fingre montrante la laborgrupanojn, kamaradoj de tiutempa partia filio diris sentime kun plena kredo pri sia praveco: “Al gvidado nekonforma al Maŭzedongpenso ni ja ne volas obei!” La revolucia ago de la partia filio ricevis subtenon de kamarado Maŭ Giŝeng, la sekretario de la partia komitato de la Ŝaŭŝan-a Komunumo. Poste, kamarado Maŭ Giŝeng serioze deklaris en iu konferenco: “Ĉiuj punoj faritaj

de la laborgrupo al la partianoj estas nuligitaj.” La partia filio de Ŝaŭŝan refoje frakasis provokon de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

En 1962, la granda renegato Liu Ŝaŭki sendis al Ŝaŭŝan siajn konfidatojn, kiuj, svingante la flagon de “laborgrupo de la Centra Komitato de la Partio”, senbride distrumpetis la “tri pliiĝojn kaj unu fikson”, “kvar liberojn” kaj aliajn nigrajn varojn. Pretekstante “plibonigon de entreprenado kaj administrado” ili intencis starigi “eksperimentan punkton” pri “fikso de produktokvanto al familio” kun la celo detruigi la popolan komunumon kaj restaŭri kapitalismon en la sankta loko de la revolucio — Ŝaŭŝan.

La partia filio de Ŝaŭŝan senlime fidela al Prezidanto Maŭ travidis la lupan koron de la “laborgrupo”. Ili kondukis la partianojn kaj revoluciajn amasojn al la malnova loĝejo de Prezidanto Maŭ, foje-refoje studis la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ “**nur socialismo povas savi Ĉinion**” kaj “**la socialisma vojo estas la unika vojo por la agrikulturo de nia lando**”, tiel ili armis la partianojn kaj amasojn per la ĉiamvenka Maŭzedongpenso por frakasi tiun provokon.

Iun tagon, la “laborgrupo” vokis parton de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al “kunsido”, ĉe kiu ili multe parolis pri la “bonoj” de “fikso de produktokvanto al familio”. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ŝaŭŝan profunde komprenis, kion signifas la “bonoj” priparolitaj de ili. Ili nereteneble rememoris popolkanton cirkulantan antaŭ la Liberigo:

*En Ŝaŭŝan val' kun val' interligiĝas,
Plejpart' de l' familioj tre malriĉas.
Tri glavoj estas super la kampuloj:
Multegas ŝuldoj, farmopagoj kaj uzuroj.
Formigro, almozpeto kaj enkarceriĝo—
Jen la tri vojoj por la malriĉuloj.*

La suferplena pasinteco vekis en ili senkomparan indignon. Iuj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj indigne stariĝis kaj riproĉe demandis al la “laborgrupo”: “Ĉu vi celas, ke ni entreprenu individue aŭ kolektive?” Ankaŭ la kamaradoj de la partia filio stariĝis kaj serioze avertis al la “laborgrupo”: “La larĝan vojon de la popola komunumo ni iras definitive. Ni nepre iros plue! Neniu povos retrotiri nin!” La partia filio de la Ŝaŭŝan-brigado gvidas la amasojn venke marŝi antaŭen, ĉiam laŭ la socialisma vojo.

FARI NOVAJN KONTRIBUOJN EN LA GRANDA KULTURA REVOLUCIO

La dazibaŭo de Prezidanto Maŭ “Bombardi la Komandejon” klarionis ofensivon kontraŭ la burĝara komandejo de Liu Ŝaŭki. El siaj multjaraj bataloj, la partia filio de Ŝaŭŝan senlime fidela

al Prezidanto Maŭ profunde komprenis la grandan signifon de tiu ĉi granda revolucio. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, alte tenante la grandan standardon “**pravas ribelo kontraŭ la reakciuloj**”, ili faris firman batalon kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. En la komenca periodo de la granda kultura revolucio, membroj de la filia komitato de la Partio iniciate publikigis la unuan dazibaŭon kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la regiono de Ŝaŭŝan, kaj sekve de tio ili ricevis venĝan baton de la lastaj. En tia stato kamaradoj de la filio pensis en si: “Respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ, ni leviĝas ribeli kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, do nia ĝenerala direkto estas senerara. Ni devas persisti en la batalo kaj ne devas retiriĝi. Ju pli intensas la batalo, des pli ĝi povas hardi nian fidelecon al Prezidanto Maŭ kaj fari nian filion vigloplena.” Ili kunvokis la partianojn por studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj la “Dek Ses Punktojn”, kaj gvidis ĉiujn rememori la historion de batalo inter la du linioj en la Partio. Iuj maljunaj partianoj diris: “Ŝaŭŝan estas loko, de kie la ruĝa suno leviĝis. La komunistoj de Ŝaŭŝan nepre devas firme stari ĉe la revolucia linio de



Kamarado Maŭ Zefen, la sekretario de la partia filio de Ŝaŭŝan senĝene diras sian komprenon en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ en studrondo de produkta grupo.



Sub la gvido de la partia filio de Ŝaŭŝan la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de la brigado denove akiris abundan rikolton de greno ĉijare, disvolvante la spiriton de penema lukto kaj sinapogo sur propraj fortoj.

Prezidanto Maŭ, vivi por batali por Prezidanto Maŭ kaj oferi sian vivon por Prezidanto Maŭ! Ni ne devas forĵeti la revolucionan tradicion de nia filio en la pli ol 40 jaroj!" Tra bataloj, ili finfine akiris la venkon.

De 1966 ĝis 1967, miloj kaj dekmiloj da ruĝgardianoj venis al Ŝaŭŝan por vizito kaj studo. La kamaradoj de la filio pensis, ke la ruĝgardianoj estas junaj revoluciaj sturmantoj subtenataj de Prezidanto Maŭ, ili venis viziti la hejmlokon de Prezidanto Maŭ, do ili estas gastoj de Prezidanto Maŭ. Ni nepre ilin akceptu bone. Varme respondante al la alvoko de la filio, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Ŝaŭŝan invitis aron post aro da ruĝgardianoj en siajn domojn kaj loĝigis ilin en plej bonajn ĉambrojn kun plej bonaj litaĵoj. La revoluciaj maljunuloj tuttage rakontis al ili revoluciajn aktivadojn de Prezidanto Maŭ en lia junaĝo, knaboj volontis esti iliaj vojkondukantoj aŭ kurieroj. Ili konkeris diversajn malfacilojn kaj entuziasme akceptis pli ol 600,000 ruĝgardianojn alvenintajn de diversaj lokoj de la tuta lando.

Dum la pli ol 3 jaroj de la Granda Proletara Kultura Revolucio, firme respondante la grandan

alvokon de Prezidanto Maŭ **"firme teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito"**, la heroaj popolanoj de Ŝaŭŝan akiris kontinuajn riĉkolkoltoj en la lastaj jaroj sub la gvido de la partia filio, prenante Daĝaj-brigadon kiel sian ekzemplon, sinapogante sur la propraj fortoj, strebante al potenciĝo kaj pene batalante kontraŭ la naturo. La brigado nun realigis mekanikigon aŭ duon-mekanikigon en rizsenŝeligo, koton-sensemigo, ole-elpremado kaj irigacio, la pomua produktkvanto de greno leviĝis de 500 ĝinoj al pli ol 900 ĝinoj. La brigado ĉiujare superplenumis la taskon de vendo de greno al la ŝtato, kaj ankaŭ la kvanto de rezervita greno kaj akumulita mono de la brigado pliiĝas ĉiujare.

Nun, aktive respondante la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ faritan ĉe la Naŭa Kongreso de la Partio **"unuĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn"**, la heroo partia filio firme decidis pli alte teni tiun ĉi ruĝan standardon persone starigitan de Prezidanto Maŭ por ke ĝi alte flirtu ĉiam en la forta kaj favora vento de la Granda Proletara Kultura Revolucio!

Mia Plej Granda Feliĉo

MI naskiĝis en la urbeto Hingōŭ de Lihian-gubernio, Hunan-provinco, kaj estas maljuna ruĝarmeano. En septembro de 1935 mi partoprenis en la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo. En la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito mi estis dufoje vundita. Poste, mi estis postenigita por okupiĝi pri loka laboro. Kaj en oktobro de 1962 mi fariĝis emerito laŭ sankcio de la supera aŭtoritato.

Kiel mi daŭre laboru por la Partio post mia emeritiĝo? Dum la lastaj jaroj mi ripetade studis la “tri popularajn artikolojn” de Prezidanto Maŭ kaj tralegis la 4 volumojn de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kun la supredirita demando. Liaj verkoj lumigis mian koron, akriĝis miajn okulojn kaj instigis min daŭrigi revolucion kaj senĉese marŝi antaŭen sur la socialisma vojo.

En la komenco de la artikolo *Servu al la Popolo* Prezidanto Maŭ jam instruis al ni: “**Nia Komunista Partio kaj la de ĝi gvidataj Oka-voja kaj Nova Kvara Armeoj estas revoluciaj trupoj, kiuj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo, kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo.**” Mi pensis: Kvankam mi jam emeritiĝis, tamen mi estas komunisto, do mi nepre devas daŭre servi al la popolo.

En somero de 1963, 16-jara knabino de iu malriĉkamparano en nia urbeto estis mordita de venena serpento kaj mortis nur post kelkaj tagoj, kio tre maltrankviligis min. Mi pensis: la laboranta popolo povas krei la mondon, ĉu ĝi ne povas konkeri eĉ tian “malutilan vermeton” kia venena

serpento? Ĉu tio ne estas servo al la popolo, ke mi povos kuraci la vundon de venena serpento? Sed pri tio mi sciis nenion. Kion do fari? El verko de nia amata Prezidanto Maŭ, mi trovis lian instruon: “**Ni povas ellerni kion ni ne komprenis antaŭe. Ni bone kapablas ne nur detruigi la malnovan mondon, sed ankaŭ konstrui la novan.**” Tiel, dum du monatoj mi vizitis pli ol dek kuracistojn, kiuj scias kuraci la vundon de venena serpento, por lerni de ili la kuracmetodon. Multaj el ili varme kuraĝigis min, pacience helpis min kaj komunikis al mi sian “familie hereditan recepton”. Kaj mi estis profunde kortuŝita de tiu ilia spirito. Poste, mi legis el iu popularscienca gazeto, ke la monta momordiko havas tre grandan efikon por kuraci mordvundon de venena serpento. Tiu informo tiel min ĝojigis, ke mi eĉ ne povis endormiĝi. Laŭdire, monta momordiko kreskas en malnova arbaro sur alta monto. Por la interesoj de la popolo, mi pensis, ke mi nepre devas ĝin trovi, eĉ se mi devos por tio eluzi ŝuojn el fero pro longa serĉado. Kunportante la brilajn “tri popularajn artikolojn” kaj kun du kamaradoj de mi invititaj, mi iris al granda monto por serĉi montan momordikon. Tiam estis ĝuste aŭgusto, la vetero estis terure varma, la monto estis alta kaj kruta kun multaj dornarbustoj kaj pro tio ni renkontis multajn malfacilojn. Foje, mi estis pikita de krabroj, tiel tre doloris kaj jukis al mi la kapo kaj lumbo. Ni iris centojn da lioj en kelkaj tagoj, sed ni ankoraŭ ne trovis ĝin. Ni ekhezitis. Ĉu ni daŭre serĉu ĝin aŭ rezignu nian strebadon duonvoje? Tiam mi rememoris la instruon de



Kamarado Han Ĉengliang rakontas al milicianoj heroaĵojn de la Ruĝa Armeo dum ĝia Longa Marŝo, kuraĝigante la junulojn disvolvi la revolucionan spiriton timi nek malfacilojn nek morton.

Prezidanto Maŭ: “**Bona kamarado estas tiu, kiu pli deziras iri tien, kie la malfaciloj estas pli grandaj.**” La vortoj de Prezidanto Maŭ donis al ni senkomparajn kuraĝon kaj forton. Ni decidis, ke ni nepre trovu montan momordikon. Kiam ni laciĝis, ni parkeris la artikolon *Servu al la Popolo*; kiam ni soifis, ni trinkis el fonto sur la monto; kaj kiam ni falis, ni tuj relevis nin kaj daŭrigis la serĉadon. Transgrimpinte kaj trairinte neniu scias kiom da montpintoj kaj malnovaj arbaroj, ni finfine trovis montan momordikon sube ĉe iu krutaĵo, kaj ni elfosis unuspire pli ol dek ĝinojn da tiaj momordikoj.

Dum longa tempo, pro la reviziisma linio antaŭenpuŝita de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki en kuraca kaj higiena laboro, kiu servis al la burĝaro sed ne al la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, la lastaj ne povis ricevi ĝustatempan kaj efikan kuracadon, kiam ili malsanis. En majo de 1964, filineto de iu malriĉkamarano estis mordita de venena serpento je la

dekstra kruro, kaj la kruro pusiĝis ĝis elmontriĝo de ostoj. Ŝiaj familianoj portis ŝin al hospitalo en urbo. Ekzameninte la vundon, iu “sinjora kuracisto” diris unue ke la kuracado kostos 200 *yuan*, kaj due, ke necesas amputi la kruron. Kaj fine li forsendis la pacientinon, pretekstante ke ŝia malsano estas “nekuracebla”. Ŝia patro jam preparis postmortajn bezonaĵojn por ŝi. Informiĝinte pri tio, mi pensis: La knabino estas posteulo de malriĉkamarano. Prezidanto Maŭ diris: “**Ne estus revolucio, se ne estus la malriĉkamaranoj.**” Kaj mi nepre devas elsavi ŝin per mia tuta forto laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ. Mi speciale sendis alian por porti la knabinon al mi. Mi propramane lavis por ŝi vundon, ŝmiris ĝin per unĝento kaj post 7 tagoj ŝia vundo estis tute resanigita. Ŝia patro estis tre dankema al mi. La vilaĝanoj demandis al mi kiom da sumo de honorario por kuracado mi volas, mi respondis: “Kial pri tio? Mi kuracas malsanulojn ja por servi al la popolo, sed ne por mono!”

Pli kaj pli multaj homoj venis al mi, ĉar mi kuracis senpage kaj cetere ĉiu malsanulo resani-

ĝis post mia kuracado. Iu kuracisto pri venenser-penta vundo, kiu havis seriozan kapitalisman penson, tre volis lerni de mi la kuracmetodojn por profiti el tio en sia profesia laboro. Por montri sian kapablon kaj akiri de mi sciojn pri uzado de monta momordiko, li speciale kaptis kobron, kiun li intencis porti al mi. Neatendite, lia maldekstra mano estis mordita de la serpento. Konsternite, li povis fari nenion alian ol tuj veni al mi. Mi resanigis lin per ĉiuj metodoj. De tio li estis kortuŝita ĝis larmoj kaj mem kritikis siajn erarajn pensojn. Mi diris al li: "Traktu de nun viajn pacientojn ankaŭ kun la spirito de k-do Bethune komplete sindoni al aliaj sen ajna konsidero pri si mem. Monta momordiko estas efika medikamento por servi al la popolamaso, sed ne kapitalo por ĉasi personajn profitojn. Vi devas aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj bone servi al la popolo." Per Maŭzedongpenso mi kondukis tiun ĉi kuraciston sur ĝustan vojon kaj komunikis al li la uzadon de monta momordiko. Multaj vizitis min ja por informiĝi pri monta momordiko. Profitante la okazon, mi faris al ili edukon de servado al la popolo. Kun ili mi lernis kune verkojn de Prezidanto Maŭ kaj interŝanĝis spertojn. Ankaŭ de ili mi akiris multajn "familie hereditajn receptojn" por kuraci brogvundon, kontuzon, ganglionan inflamon k. a.

Dank' al la saĝo kaj forto, kiujn donis al mi Maŭzedongpenso, dum la lastaj jaroj mi resanigis sume 36 homojn morditajn de venena serpento, kaj centojn da brogvunditoj kaj kontuzitoj, inter kiuj multaj kazoj estis kompare seriozaj. Foje, du bovoj de iu produkta grupo interluktis, kaj la estro de la grupo provis fortiri unu el ili kaj estis faligita de ĝi per tuŝego. Li estis serioze vundita je la kapo kaj sangis senĉese, kaj svenis duonhoron. Kelkaj komunumanoj portis lin al mi kaj mi tuj ŝmiris lian vundon per unĝento. Post kelktempa kuracado, li fine resaniĝis.

De post mia emeritiĝo, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ "**Disvolvi la revolucian tradicion kaj akiri pli grandan gloron**", mi daŭre konservas, en klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento, la stilon de penema luktado en malfaciloj, ĉiam laborante kaj batalante kune kun la popolamasoj, tiel en ekspluatado de virga tero kaj kulturado de kampoj, kiel en batalo kontraŭ sekeco aŭ inundo kaj konstruado de ŝoseo aŭ kajo.

En vintro de 1965, aktive respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "**Lerni de**

Daĝaj en agrikulturo", kune kun la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj mi ĵetis min en la batalon por ekspluati virgajn montojn. Prenante la Malsaĝan Avon kiel ekzemplon, dum la ferioj de Printempa Festo mi iris labori sur la monto kune kun miaj filoj kaj miaj nevoj kaj pranevoj, kiuj vizitis mian familion. La amasoj estis kortuŝitaj de tio kaj ankaŭ ĵetis sin en la batalon unuj post aliaj. Firme tenante en mia memoro la instruon de Prezidanto Maŭ "**La Longa Marŝo estas propaganda trupo kaj ankaŭ semilo**", mi laboris kaj samtempe faris propagandon dum tiu periodo. En laborpaŭzoj, mi gvidis la amasojn studi la "tri popularajn artikolojn" kaj kuraĝigis ilin lerni de la Malsaĝa Avo. Kaj samtempe, mi rakontis al ili pri la okazintaĵoj dum la Longa Marŝo, kiun mi partoprenis sekvante Prezidanton Maŭ, kaj la spirito de penema luktado en malfaciloj, reganta siatempe en Jan-an. Trovinte bonajn homojn kaj bonajn aferojn, mi mem verkis kaj kantis por laŭdi ilin. Tiel mi pluapaŝe stimulis ilian revolucian spiriton de batalo kontraŭ la naturo kaj sentimo al malfaciloj, tiel ke ni plenumis nian taskon je 11 tagoj antaŭ la planita dato.

En decembro de 1968, post publikigo de la nova instrukcio de Prezidanto Maŭ "**intelektaj junuloj iru al la kamparo kaj ricevu reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj**", mi tuj fondis studrondon de Maŭzedongpenso en mia familio. Sidante antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ, mia tuta familio kune studis tiun plej novan instrukcion kaj plezure eldiris sian penson kaj planon. Mia edzino diris la unua: "Mi apartenas al la laboranta popolo kaj ne devas vivi en la urbo senfare!" Mia plej aĝa filino Fuĝen, kiu finis sian lernadon en malsupera mezlernejo, diris: "Mi definitive iros la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ." Iliaj vortoj varmigis mian koron, kaj mi diris: "Tre bone! Vi aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj havas noblan volon. Do, ni skribu kune petskribon!" Post la aprobo de la revolucia komitato de la urbeto, mia familio transloĝiĝis en la kamparon. Sub nia influo multaj intelektaj junuloj kaj loĝantoj de urbetoj iris fiksloĝiĝi en kamparo unuj post aliaj.

En la pasinteco, mi militiris norden kaj suden sekvante Prezidanton Maŭ kaj dediĉante mian tutan koron al la revolucio. De nun, mi dediĉos mian tutan vivon al la Partio kaj la popolo, kaj tio estas mia plej granda feliĉo.

Marnavigo Dependas

de Stiristo

LA ŝipo de la nova Ĉinio jam faris brilan vojaĝon de 20 jaroj laŭ la direkto al socialismo montrita de la granda stiristo Prezidanto Maŭ.

Vicprezidanto Lin diris: “Marnavigo dependas de stiristo, kaj revoluciado dependas de Maŭzedongpenso.” Sub la saĝa gvidado de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, dum la pasintaj 20 jaroj, la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando atingis ekstreme grandajn sukcesojn. La malnova Ĉinio, lando tiom malriĉa kaj postiĝinta antaŭ la Liberiĝo, jam turniĝis en nunan grandan socialisman landon kun fundamenta prospero. Precipe, post la bapto en batalo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, nia granda socialisma patrolando montras sin ankoraŭ pli prospera.

Sub la nutrado de Maŭzedongpenso, ankaŭ mi kreskis kune kun la patrolando dum tiu periodo. Antaŭ la Liberiĝo mi naskiĝis en malriĉa kamparana familio. Mia patro servis ĉe bienulo kiel dungito kaj mortis pro pezega laboro, postlasinte min kaj mian patriron, la orfon kaj vidvinon, al turmentado de mizera vivo. Estis Prezidanto Maŭ, nia granda savanto, kiu savis nin el la marfundo de mizero. En 1947, kiam mi estis 15-jara, mi glorie aliĝis al la Ĉina Popola Liberiĝa Armeo kaj militiris suden kaj norden kun la trupoj batalante kontraŭ la bandita kliko de Ĉiang Kajŝek. Trovante ke mi amas kanti popolajn kantojn kaj ludi popolajn muzikilojn, estro de la trupo sendis

min al la armea ensemblo por tie lerni. La veteranaĵ literaturaj kaj artaj laborantoj, kiuj venis de la revolucia sanktejo Jan-an, helpis min studi la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* kaj klariĝis al mi la veron, ke la literaturo kaj arto devas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al la proletara politiko. Kaj ili ofte kune kun ni iris al fabrikoj, vilaĝoj kaj kazernoj por fari tie prezentadojn. Post lernado dum tiu periodo, mi ricevis bonan hardadon kaj mia politika konscio multe altiĝis.

Tamen, sur la antaŭenira vojo mi faris ankaŭ zigzagon. Post nia veno en urbon, iuj burĝaraj reakciaj “artaj aŭtoritatuloj” senbride kolportis al ni klasikan muzikon de la okcidenta burĝaro, fanfaronante ke tiu estas la “kulmino de la muzika kulturo de la homaro”, por logi nin junajn muzikajn laborantojn ĝin adori. Kaj sub la influo de la nigra literatura kaj arta linio de la burĝaro, mi komencis blinde strebi al la okcidenta voĉa muziko kaj majstreco, kaj dum certa tempo, mi forjetis en mia prezentado nacian stilon bonvenigatan de la popolamaso. Laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj skribis al ni bedaŭre: “Kamarado Ŝuangjin, vi estis proksima al ni, kiam vi kantis popolajn kantojn en la pasinteco; nun vi kantas fremdlandajn kantojn, ni sentas ke vi estas malproksima de ni.” Ankaŭ la partia organizo ĝustatempe montris al mi mian eraran tendencon kaj instigis min peti instruojn el verkoj de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ diris: “La pro-

blemo por kiuj estas literaturo kaj arto estas problemo fundamenta, problemo de principo. “Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.” La granda instruo de Prezidanto Maŭ ore brilanta lumturo lumigis al mi la antaŭenmarŝan vojon, tiel ke mi rapide revenis sur la vojon de servo al la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj!

Plena de fervoro, mi surŝultrigis mian pakajon, iris profunden en fabrikojn, minejojn kaj foran kamparon kaj kombiniĝis kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, kune kun ili manĝante, loĝante, lernante, laborante kaj batalante. Tiel mi profundigis mian klasan sentimenton al laboristaj kaj kamparanaj amasoj kaj kreis iujn verkojn, kiuj spegulis la realan vivon de laboristoj kaj kamparanoj kaj ricevis bonan akcepton kaj laŭdon ĉe vastaj amasoj. El tio mi profunde sentis ke revolucia muzika laboranto povas eduki aliajn kaj pli bone servi al la vastaj amasoj per sia verko kaj voĉo, nur se li, sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ, longe kaj senkondiĉe iris inter laboristajn kaj kamparanajn amasojn por sin hardi, lernis de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, bone konis ilin kaj, antaŭ ĉio, mem estis kortuŝita de la prikantotaj objektoj.

La kanto *Marnavigo Dependas de Stiristo* estis kreita de kamarado Ju Ven kaj mi en printempo de 1964. Ĉiufoje, kiam mi kantas ĝin antaŭ publiko, en mia koro leviĝas neregeblaj emociaj ondoj, kaj revenas al mia memoro tiuj pasintaĵoj, kiuj grave digis nin je kreado de tiu kanto.

Mi povas neniam forgesi la maljunan estron de produkta grupo, tiun malriĉkamparanon, kiun mi ekkonis en la Norda Dezertejo, kiam mi laboris kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj en iu vilaĝo. Kun alta aĝo kaj ruĝa koro, li senlime fidelas al Prezidanto Maŭ kaj varme amas la kolektivon. Ĉiutage, antaŭ la mateniĝo, li petis min legi por li kelkajn paragrafojn el verkoj de Prezidanto Maŭ. Per Maŭzedongpenso li gvidis la vastajn komunumanajn amasojn turni la kalvajn montojn en bonajn kampojn kaj estis laŭdata kiel la “Malsaĝa Avo”. Mi povas neniam forgesi ankaŭ la tagojn kaj noktojn, kiujn mi pasigis kune kun la laboristoj de Daking. Matene, ili staris sur la granda stepo vizaĝe al Pekino kun koro inklina al Prezidanto Maŭ kaj kantis la kanton *Ruĝas la Oriento*. Nokte, ili ĉirkaŭsidis en tendoj kaj soife studis verkojn de Prezi-

danto Maŭ. Sekvante lian instruon “sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”, ili mem konstruis domojn ne havante loĝejojn, kaj ili uzis siajn brakojn kaj ŝultrojn ne havante transportilojn. La kvar volumojn de brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ servis por ili kiel orientilo kaj ili ĵuris nepre konkeri la grandan olekampon. La granda epoko, la bolanta vivo kaj la senlima, varma klasa amo, kiun la vastaj popolamasoj havas por Prezidanto Maŭ, ĉiumomente inspiris min kaj mi kvazaŭ refoje vidis antaŭ mi la longan homvicon antaŭ la pordoj de Hinhua-librejo atendantan por aĉeti la *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong*, kaj tiujn kiuj ricevis la libron ĝojegantajn kvazaŭ ricevintajn trezoron. Iu maljuna laboristo diris kun profunda tuŝiteco: “Fiŝoj ne povas vivi for de akvo, melonoj ne povas kreski for de sia stolono, kaj la revoluciaj amasoj ne povas forlasi Maŭzedongpenson. Por revolucii oni ne povas ne studi bone la verkojn de Prezidanto Maŭ!”

Mi memoris kaj memoris ĝis tre tre fora antaŭeco. Retrorigardante la trairitan brilan vojon de la ĉina revolucio, kiun paŝon ni povas trovi nefaritan sub la gvido de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ! Kiu paĝo de la epopeo pri la ĉina revolucio ne radias brilojn de Maŭzedongpenso! Ho, kvazaŭ ŝipo sur la maro, la ĉina revolucio senĉese iras antaŭen de venko al venko kontraŭ insidaj ŝtormoj kaj ondegoj, evitante danĝerajn rifojn, dank’ al la direkto de la granda stiristo Prezidanto Maŭ. Marnavigo dependas de stiristo, kaj revoluciado dependas de Maŭzedongpenso. Tio estas la plej forta voĉo de la epoko kaj la elkoraj vortoj de la centmilionoj da revoluciaj amasoj! Kiel fluo havas sian fonton kaj arbo siajn radikojn, la kanto *Marnavigo Dependas de stiristo*, kiun ni kreis, havas sian fonton en la senlima, arda amo de la vastaj revoluciaj amasoj al Prezidanto Maŭ.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: “**Muzikistoj devas doni sian atenton al la kantado de la amasoj.**” Dum kreado, antaŭ ĉio ni konsideris la kompreneblecon kaj akcepteblecon por la vastaj amasoj kaj klopodis, ke la kanto havu klare percepteblan temon kaj estu vigla kaj forta, intima kaj facila, populara kaj flua. En mia infaneco, mi jam tre amis nacian muzikon kaj lernis en diversaj tempoj kelkajn specojn de opero, *ĉjuji* (komuna nomo por diversaj artformoj el rakontado kaj kantado) kaj popola muzikilo. Sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo**”, mi komponis la muzikon por la

Nilona Prestabulo

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj de Hinhua-presejo, Siĉuan-provinco, kun la sentima revolucia spirito kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, venkis multajn malfacilojn, provis pli ol cent fojojn kaj sukcese elfaris nilonan prestabulon el materialo produktita de nia lando kaj kreis tre favoran kondiĉon por bonkvalita kaj grandrapideca presado de verkoj de Prezidanto Maŭ.

La nilona prestabulo posedas specialajn elastecon kaj fortikecon kontraŭ frotado kaj ebligas longan kaj bonkvalitan preson. Oni konstatis per scienca mezurado, ke per tia prestabulo oni povas presi almenaŭ 2,500,000 kopiojn.

Aŭtomato por Presi Littukon

La unua aŭtomato por presi littukon de tipo 6941 de Ĉinio estas sukcese projektita kaj fabrikita de la revoluciaj laboristoj mem de la Kotona Teksejo de Hinhiang, Henan-provinco. Tio estas alia nova venko de la granda principo de sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj.

Tiu ĉi aŭtomato por presi littukon longas 33 metrojn, larĝas 3 metrojn kaj konsistas el pli ol 7,000 maŝinpecoj. Ĝi povas presi littukojn de diversaj larĝoj de 4 ĝis 7 futoj kaj povas presi je 11 koloroj. Ĝia laborefiko estas 4.2-oble pli alta ol manlabora efiko kaj dank' al ĝia instaliĝo multe reduktiĝis la laborintenseco de laboristoj.

kanto *Marnavigo Dependas de Stiristo*, surbaze de nia nacia muziko kaj adoptante melodion konvenan por esprimi la novan senton de la popolo de la nova epoko. La vastaj amasoj donis al ni varmajn zorgojn kaj helpojn, prezentante multajn valorajn opiniojn tiel pri la teksto kiel pri la muziko. Dank' al 7-8-foja revizio, la kanto fariĝis iom post iom pli malpli senmanka. Tiu kanto ne nur estas kreaĵo de kolektivo sed en ĝi kuniĝis ankaŭ la senlima fideleco de la vasta amaso al Prezidanto Maŭ.

Post la publikigo de la nomita kanto, ĝi trovis varman akcepton ĉe la vastaj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj, kiuj kun profunda proletara sentimento al Prezidanto Maŭ amas ĝin aŭskulti kaj des pli ĝin kanti. Multaj el ili skribis al mi: "Mi tre amas aŭskulti kaj kanti la kanton *Marnavigo Dependas de Stiristo*. Tio, kion diras la kanto, estas tre prava. Ĝi vere elkantis nian koron! Aŭskultante aŭ kantante tiun kanton, ni ekpensas pri nia estimata kaj amata Prezidanto Maŭ kaj eksentas, ke multe plivastiĝas mia menso, energio plenigas mian korpon, kaj nenia malfacilo estas plu por mi malfacilo!" Kial tiu kanto estas tiel bonvena al la amaso? Ĉu pro tio, ke nia muziko estas bona aŭ nia voĉo estas agrabla? Ne. Nur pro tio, ke la kanto prikantas nian estimatan kaj amatan grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, elkantas la veron, ke "revoluciado dependas de Maŭzedongpenso", kaj plene esprimas la senliman amon, senliman konfidon, senliman adoron kaj senliman fidelecon de la vastaj popolamasoj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!

Prezidanto Maŭ instruis al ni: "... la laboro de ĉiuj revoluciaj literaturistoj kaj artistoj havas signifon nur se ili intime rilatiĝas kun la amaso, esprimas ĝin kaj agas kiel ĝia fidela proparolanto." Mi profunde sentas ke tio estas la plej granda gloro kaj la plej granda feliĉo en la vivo por revolucia muzika laboranto povi prikanti la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson kaj servi al la vasta amaso. Mi estos por ĉiam fidela al Prezidanto Maŭ, luktos por krei novajn muzikaĵojn de la proletaro, kaj kantos pri la eniro de la mondo en la grandan novan epokon!

*La aŭtoro estas la komponisto de la muziko de la kanto *Marnavigo Dependas de Stiristo* kaj vicĉefkomitatano de la revolucia komitato de la Harbina Operejo. La kanto estis publikigita en nia gazeto, n-ro 7, 1967.


Armeanoj kaj Popolanoj de la Ĉefurbo Gaje Celebras la Nacian Feston



Alte tenante la grandan sloganon “Firme teni la revolucion, stimuli la produkton”, la revoluciaj amasoj trapasas Tian-anmen-placon kantante kaj dancante por aklami la riĉikolton de nia agrikulturo en la lastaj jaroj.



Kvarcent mil armeanoj kaj popolanoj de la ĉefurbo okaz datrevenon de la fondiĝo de la granda Ĉina Popola R



gas grandiozan manifestacion por varme celebri la 20-an spubliko.



La reprezentantoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiuj partoprenas la nacifestan revuon, varme krias kun senkompare feliĉa sento: "Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!"

Firme tenante sian pafilon kaj kun alta batalspirito, ĉefurbaj milicianoj heroe paradas dum la Nacia Festo.



Batalu por Plue Firmigi la Proletaran Diktaturon

— Por Celebri la 20-an Datrevenon de la Fondiĝo de la
Ĉina Popola Respubliko

Enhavo:

**Parolado de Vicprezidanto Lin Biaŭ ĉe la Mitingo
por Celebri la 20-an Datrevenon de la Fondiĝo
de la Ĉina Popola Respubliko**

**Parolado de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj ĉe la Akcepta
Kunveno por Celebri la 20-an Datrevenon de
la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko**

Batalu por Plue Firmigi la Proletaran Diktaturon

— Por Celebri la 20-an Datrevenon de la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko
Ĉefartikolo de la ĵurnalo *Renmin Ribao*, gazeto *Hongqi* kaj ĵurnalo *Jiefangjun Bao*

**Sloganoj por Celebri la 20-an Datrevenon de la
Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko**

La libro estas eldonita en la lingvoj esperanta, angla, araba, bengala, birma, franca, germana, haŭsa, hindia, hispana, indonezia, itala, japana, korea, laosa, mongola, persa, portugala, rusa, sŭahilia, taja, tamila, turka, urdua kaj vjetnama.

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio

Havebla ĉe lokaj librovendejoj aŭ rekte ĉe
Sekcio por Poŝta Mendo, Guozi Shudian, P. O. Kesto 399,
Pekino, Ĉinio

Nia Lando Venke Faris Novan Eksplodigon de Hidrogena Bombo kaj Sukcese Faris Sian Unuan Subteran Nuklean Provon

En la tempo kiam la armeo kaj popolo de la tuta lando varme celebris la brilan feston de la 20-a datreveno de la fondiĝo de la granda Ĉina Popola Respubliko, nia lando venke faris novan eksplodigon de hidrogena bombo super sia okcidenta parto en la 29-a de septembro, 1969; antaŭ tio, je la 23-a de septembro, 1969, nia lando sukcese faris sian unuan subteran nuklean provon.

Tio estas granda venko de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso! Tio estas alia granda frukto de la Granda Proletara Kultura Revolucio! Tio estas rezulto de la penoj de la ĉinaj laboristoj, komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo, inĝenieroj, teknikistoj kaj sciencaj laborantoj, sinokupantaj pri la esplorado, fabrikado kaj eksperimentado de nukleaj armiloj, kaj aliaj koncernaj personoj, kiuj, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro, aktive respondante la alvokon de Prezidanto Maŭ **“unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn”**, alte tenas la grandan ruĝan standardon de Marksismo - Leninismo - Maŭzedongpenso, elstarigas la proletaran politikon, profunde disvolvas la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, plene efektivigas la diversajn batalajn taskojn elmetitajn de la Naŭa Kongreso de la Partio kaj **“tenas la revolucion, stimulas la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito”**.

Tiuj novaj atingoj en disvolvo de nukleaj armiloj de Ĉinio estas alia peza bato al la nuklea monopolo de la usona imperiismo kaj social-imperiismo, estas granda kuraĝigo kaj subteno al la heroo vjetnama popolo brave kondukanta sian nacisavan militon kontraŭ la usona agreso, al la laosa popolo batalanta kontraŭ la armita invado de la usona imperiismo kaj la tajlandaj reakciuloj, al la popoloj de Palestino kaj aliaj arabaj landoj rezistantaj kontraŭ la agreso de la usona imperiismo kaj la cionismo kaj al la popoloj de ĉiuj landoj heroe batalantaj por sia nacia sendependeco kaj sia liberiĝo.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“Altigi singardemon, defendi la patrolandon.”** Ke Ĉinio faras necesajn sed limigitajn nukleajn provojn kaj disvolvas nukleajn armilojn, tio celas ekskluzive sindefendon kaj rompon de la nuklea monopolo, kaj la fina celo estas ekstermi nukleajn armilojn. La ĉina registaro plurfoje deklaris solene, ke en ĉiu ajn tempo kaj en ĉia ajn cirkonstanco Ĉinio absolute ne uzos la unua nukleajn armilojn. Same kiel antaŭe, la ĉina popolo kaj la ĉina registaro daŭre klopodos kaj persiste luktos kune kun la tutmondaj revoluciaj popoloj kaj la sendependecon defendantaj kaj pacamaj landoj, por la nobla celo de kompleta malpermeso kaj ĝisfunda detruo de nukleaj armiloj.

Surgrimpi la Novan Kulminon de Scienco kaj Tekniko Dank' al Maŭzedongpenso

RUGĀS la oriento, leviĝas la suno. Sub la direktado de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, nia granda patrolando marŝis jam dudek jarojn sur la socialisma vojo. Retrorigardante la batalan vojon iritan en la lastaj 20 jaroj, ni sentas senkomparan emociiĝon, senkomparan feliĉon kaj senkomparan fierecon.

Jam antaŭvespere de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: “Tuj kiam la sorto de Ĉinio estas ektenita en la manoj de la popolo mem, Ĉinio, same kiel la suno leviĝanta en la oriento, prilumos la tutan teron per sia brila flamo, rapide forlavos la kotaĵojn postlasitajn de la reakcia registaro, resanigos la vundojn de milito kaj konstruos tute novan, potencon kaj prosperan popolan respublikon, adekvatan al la nomo.” La procedo de la historio plene pruvis la saĝan antaŭvidon de Prezidanto Maŭ.

Dum la lastaj 20 jaroj, sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ni akiris grandajn venkojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. La Granda Proletara Kultura Revolucio en la lastaj pli ol tri jaroj ĝisfunde ruiniĝis la burĝaran komandojn kun la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki ĉe la kapo, kritikis lian kontraŭrevolucionan reviziisman linion, senprecedence disvastigis Maŭzedongpenson inter centmilionojn da popolanoj, multe vekis aktivecon de la vastaj popolamasoj en la revolucio kaj produkto kaj puŝas la socialisman aferon al pli profunda disvolviĝo. La heroa popolo armita de Maŭzedongpenso verkis per siaj manoj plej novajn kaj plej belajn artikolojn kaj pentris plej novajn kaj plej belajn bildojn sur nia vasta malriĉa kaj kulture postiĝinta patrolando.

Kun la rapida disvolviĝo de industria kaj agrikultura produkto, la scienca kaj teknika fronto de nia lando estas en plena vigleco kaj prospero, progresas impete kaj kreis multajn miraklojn en la mondo. La konstruita Nankina Jangzi-pontego estas granda kreo en la monda historio pri la konstruo de pontoj; la sukcese fabrikita 125,000-kilovata vaporturbina generatoro kun duobla akva interna malvarmigo atingis la progresintan nivelon de monda elektromaŝina industrio; la nova akupunktura terapio malfermis la pordon al kuraco de surd- kaj mut-malsanoj kaj kuracis multajn aliajn specojn de “nekuraceblaj malsanoj”. La sinsekvaj sukcesaj provoj de atombomboj, testitaj ĵetarmiloj kaj hidrogenbomboj koncentriĝe markis rapidan disvolviĝon de socialismaj industrio, scienco kaj tekniko de nia lando. De eksplodigo de la unua atombombo ĝis la unua provo de hidrogenbombo, Usono pasigis 7 jarojn kaj 4 monatojn, Britio pasigis 4 jarojn kaj 7 monatojn. De la sukcesa eksplodigo de la unua atombombo ĝis la nuklea eksplodigo kun termonuklea materialo, nia lando pasigis nur pli ol unu jarojn; kaj 2 jarojn kaj 8 monatojn post tio ni sukcesis eksplodigi nian unuan hidrogenbombon. Antaŭ la feraj faktoj eĉ niaj malamikoj ne povas ne konfesi ke niaj pintaj scienco kaj tekniko disvolviĝas plej rapide en la mondo.

La pli rapida disvolviĝo de niaj scienco kaj tekniko en naci-defendo multe pliigis naci-defendan forton de nia lando, donis pezan baton al nukleantaĝa politiko de la usona imperiismo kaj social-imperiismo, disrompis ilian pozicion de nuklea monopolo, ege kreskigis la batalvolon de diverslandaj revoluciaj popoloj, forte faligis la arogantecon de imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj kaj

multe kuraĝigas kaj subtenas la revoluciajn batalojn de diverslandaj popoloj.

Ĉiuj atingoj de nia lando en scienco kaj tekniko estas grandaj venkoj de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj de lia orientilo **“sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”**. Ili elokvente pruvis, ke Maŭzedongpenso estas kompasoj por surgrimpigi la kulminon de la scienco kaj tekniko kaj ora ŝlosilo por malfermi la trezorejon de scienco kaj tekniko. Nur se ni agas laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ, ni venkos, marŝos antaŭen kaj povos surgrimpigi la mondan kulminon de scienco kaj tekniko. Ni certe superos ilin ĉiujn, tute egale, kia imperiismo aŭ social-imperiismo ili estas kaj kiajn atombombojn, telestiratajn ĵetarmilojn kaj hidrogenbombojn ili havas.

En la lastaj 20 jaroj, nia scienca kaj teknika afero, kiel aliaj aferoj, estas plena de intensaj bataloj inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj.

De la unua tago, kiam la ĉina popolo komencis disvolvi siajn pintajn sciencojn kaj teknikon, la moderna reviziismo subtenate de la usona imperiismo jam faris blokadon kaj subfosadon kontraŭ nia lando. Post la malsukceso de sia intrigo, ili refoje provis strangoli la disvolviĝon de niaj pintaj teknikoj kaj nacia ekonomio. Ili ankoraŭ arogante kriaĉis: Ĉinio “ne povos fari atombombon eĉ en dek jaroj”! En tiu tempo, plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon sinkaŝintaj en nia partio, reprezentata de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, submetiĝis al la premo de la imperiismo kaj moderna reviziismo. Spirante kun siaj mastroj per la sama naztruo ili energie dissemis pesimismojn kaj blovis “deĉevaliĝan venton”; ili plenforte distrumpetis “teknikon en la unua loko”, “linion de sinapogo sur specialistoj”, “materian stimolon”, kompradoran sklavecon antaŭ fremduloj kaj rampismon. Ili degenerigis kaj diserigis la vicarojn de sciencaj kaj teknikaj laborantoj per kapitalisma penso, ĉiamaniere intencis subfosi kaj limigi la disvolvigon de la nacidefendaj scienco kaj tekniko fare de la ĉina popolo. Ili vane provis ŝanĝi sciencan kaj teknikan kampon en pozicion por restaŭri kapitalismon en servo al sia krima intrigo uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj ŝtato.

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, elstarigante la proletaran politikon, sinapogante sur la propraj fortoj, peneme luktante en malfaciloj, eliminante superstiĉojn kaj liberigante la penson, la ĉina laborista klaso, la

Popola Liberiga Armeo kaj revoluciaj intelektuloj, armitaj per Maŭzedongpenso kun heroa spirito sin vicigi en la mondaj nacioj, realigis en mallonga periodo la grandan alvokon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **“Fari iom da atomaĵoj kaj hidrogenaj bomboj, mi opinias tion tute ebla en la daŭro de dek jaroj”**, kaj frakasis unu post alia intrigojn de la enlandaj kaj eksterlandaj klasaj malamikoj.

Vicprezidanto Lin instrukiis al ni: “Maŭzedongpenso fariĝos neelĉerpebla forto kaj senkompare potenca spirita atombombo, kiam ĝi estas posedata de la vastaj popolamasoj.” Ĉiu atingoj en scienco kaj tekniko de nia lando disradias la brilon de Maŭzedongpenso kaj manifestas ĝian senkomparan potencon. Estas la instruoj de Prezidanto Maŭ **“tutkore kaj tutanime servi al la popolo”**, kiu instigis nin timi nek penadon nek oferon, konkeri ĉiujn malfacilojn, brave marŝi antaŭen kaj heroe nin oferi al la ĉina revolucio kaj la monda revolucio; estas la brila materiisma kaj dialektika penso de Prezidanto Maŭ, kiu donis al ni neelĉerpeblan saĝon kaj ebligis al ni konkeri malfacilojn en tekniko; estas lia instrukcio **“energie kunlaboru”**, kiu ebligis ke la edukaj, studaj kaj produktaj unuoj disvolvis komunisman stilon kaj kune plenumis kontentige diversajn taskojn, sinapogante sur la amasoj, kredante ilin, plene disvolvante ilian saĝon kaj efektiviĝante la orientilon kombini sciencajn kaj teknikajn laborantojn kun laboristoj kaj teorion kun praktiko; estas la instruoj de Prezidanto Maŭ **“la homaro ĉiam devas konstante resumi sperton kaj fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreaĵojn kaj novajn progresojn”**, kiu ebligis ke ni estas ne fieraj dum sukceso en laboro, ĉiam diligente laboras, daŭre faras klopodojn, senĉese resumas spertojn kaj plue surgrimpas novan kulminon.

El multaj spertoj resumitaj en la disvolviĝo de niaj scienco kaj tekniko, la plej radikala estas per Maŭzedongpenso armi homojn, reformi ideologion de sciencaj kaj teknikaj laborantoj kaj realigi ideologian revoluciigon. Ĝuste kiel niaj kamaradoj diras: “Homoj agas laŭ vortoj de Prezidanto Maŭ, do maŝinoj funkcias obee al la homoj, do telestirata ĵetarmilo povas pafiĝi en la ĉielon kaj hidrogenbombo povas eksplodi.”

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **“Kolosa tasko de socialisma konstruado de nia lando ja bezonas kiel eble plej multe da intelektuloj por ĝin servi.”** Li ankoraŭ montris: **“Ni esperas, ke la intelektuloj de nia lando daŭre antaŭen iros.”**

Skoriiga Karbopulvora Gasgeneratoro de Granda Tipo Estas Sukcese Konstruita

En la alta tajdo de tenado de la revolucio kaj stimulo de la produkto, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj de la Gilin-a Kemisterka Fabriko disvolvis la sentiman revolucion spiriton kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, sukcese projektis kaj konstruis, en nur kvar monatoj, la unuan skoriigan karbopulvoran gasgeneratoron de granda tipo en nia lando por produktado de sinteza amoniako kaj tiel elhakis novan vojon por la disvolvo de kemisterka industrio de nia lando.

La konstruita skoriiga karbopulvora gasgeneratoro de granda tipo karakteriziĝas per alta temperaturo, plena forbrulo de karbopulvoro kaj bonkvalita gasigo. Dank' al uzo de tia gasgeneratoro, la utiliga procento de karbono en karbo povas esti altigita de 60-70 procentoj ĝis pli ol 95 procentoj kaj la produktiveco de tia gasgeneratoro estas duoblo de tiu de la malnova. Tial, oni povas ne nur ŝpari grandan kvanton de karbo por la ŝtato, sed ankaŭ eltiri valorajn metalojn kaj efektiviĝi sintezan utiligon de karbo.

Akcepta Aŭtomato de Poŝtpakaĵoj

Nun, sendantoj de pakaĵoj en la poŝtoŝicejo ĉe la Popola Strato de Pekino ne plu bezonas longe atendi, ĉar tie moderna maŝino faras grandan kvanton da laboroj anstataŭ poŝtoŝicistoj kaj kvaroble plirapidigis la procedon de akceptado de pakaĵoj. Ricevinte kontrolitan kaj fermitan pakaĵon, la deĵoranta poŝtoŝicisto ĝin metas sur pesteleron, ekpremas prembutonon kaj tuj povas sciigi la pezon kaj pagendan sendkoston kaj baldaŭ doni kvitancon, sur kiu klare presiĝis la numero, pezo, sendkosto, senddato kaj numero de la deĵoranto. Ĉio ĉi tio estas plenumita je 20-30 sekundoj. Tiu maŝino estas nia unua akcepta aŭtomato de poŝtpakaĵoj, projektita kaj fabrikita de la laboristoj de la Riparejo de Poŝtaj Maŝinoj de la Pekina Poŝtoŝicejo dum la Granda Proletara Kultura Revolucio.

Tiu ĉi maŝino konsistas ĉefe el la kvar partoj por peso, kalkulo, preso kaj sumigo kaj povas precize kalkuli la sendkoston de pakaĵoj kun malsamaj pezaj sendataj al 38 regionoj de malsamaj pezaj kaj aŭtomatigis la procedon de akcepto de poŝtpakaĵoj.

Prezidanto Maŭ ĉiam donas grandan atenton sur la disvolvado de la rolo de la vastaj intelektulaj amasoj de nia lando en la revolucio kaj konstruado kaj plej zorgas sanan kreskadon de la intelektuloj. En la lastaj 20 jaroj, sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj sub nutrado de Maŭzedongpenso, niaj revoluciaj intelektuloj ludis sian rolon kaj kontribuis sian forton en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Sed, ĉu laŭ la postulo de disvolviĝo de la revolucia situacio aŭ laŭ la aktuala stato de la intelektuloj, estas necese ke ni faru ankoraŭ pli grandan klopodon. Se la revoluciaj intelektuloj volas sekvi la paŝojn de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj fari iom da kontribuoj por la Partio kaj popolo, ili devas klopodi vive studi kaj vive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ, armi sin per Maŭzedongpenso, energie remuldi sian mondkoncepton, akcepti reedukon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj iri la vojon kombini sin kun ili. Nur tiamaniere, ili povas marŝi antaŭen daŭre laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ kaj fari novajn kontribuojn por la socialisma patrolando.

En la praktiko de la revolucio kaj produkta batalo, mi ripetade studas la instruon de Prezidanto Maŭ **“La amaso estas vera heroo, dum ni mem estas ofte infanece ridindaj”**, konsiliĝas kun la amasoj kaj modeste lernas de ili kiel ilia lernanto. La intelektuloj el la malnova socio, kiel mi povas efektive ellerni kaj posedi Maŭzedongpenson, ŝanĝi sian malnovan ideologion, starigi al si proletaran mondkoncepton kaj pli bone servi al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, nur se ili sin ĵetas en la tri grandajn revoluciajn movadojn de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento kaj akceptas reedukon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La revolucia torento ruliĝas antaŭen, la patrolando en konstruado estas ĉiam pli prospera kaj la scienco kaj tekniko disvolviĝas fluge. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ havas al ni senliman esperon. Retrorigardante la pasintecon, ni sentas nin plenaj de fieroj pri akiritaj venkoj; en rigardo al la estonteco nia batalspirito kreskas duoble. Ni decidis, sub gvido de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Viceprezidanto Lin kiel la vicestro, alte teni la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, elstarigi la proletaran politikon, firme iri la revolucionan vojon montritan de Prezidanto Maŭ kaj brave marŝi antaŭen sur la vojo grimpi la novan kulminon de scienco kaj tekniko, disvolvante la revolucionan spiriton timi nek malfacilojn nek morton.


Refoja Grandmezura Prezredukto de Medikamentoj

SUB la profunda prizorgo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj en la bonega situacio de grandaj venkoj de la Granda Proletara Kultura Revolucio, lastatempe, nia lando plenamplekse, grandmezure kaj landskale reduktis la prezojn de medikamentoj. La meznombra prezo de medikamentoj estas nun je 37 procentoj malpli alta ol tiu antaŭ la prezredukto farita en la 1-a de aŭgusto ĉijare kaj je 80 procentoj malpli alta ol tiu en 1950. Ankaŭ la prezoj de ku-

racaj instrumentoj, kemiaj farmaciaĵoj kaj biologiaj preparaĵoj estas reduktitaj en malsamaj gradoj.

Ekde la fondiĝo de la nova Ĉinio, la medikamentaj prezoj de nia lando senĉese reduktiĝis kun la rapida disvolviĝo de medikamenta produktado. Ĉifoje la plua plenampleksa kaj grandmezura prezredukto multe malpezigis la ŝarĝon de nia popolo en medikamentaj elspezoj, kio estas granda ĝojiga afero en la vivo de la laboranta popolo de

nia lando. Tio denove manifestis plene la profundan prizorgon kiun donas la Centra Komitato de la Partio kun la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro al la vivo kaj sano de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj de la tuta revolucia popolo, kaj plene elmontris la senkomparan superecon de la socialisma sistemo de nia lando. Tio estas granda venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj giganta frukto



La Pionira Higiena Sekcio Tutkore kaj Tutanime Servanta al la Popolo de iu trupo de la Popola Liberiga Armeo produktas medikamentojn por la kamparanoj.



Kamaradoj de sanprotektejo de iu trupo de la Sudmara Floto de la Liberiga Armeo surgrimpas krutafon por kolekti valorajn drogherbojn.



akirita de la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj, teknikistoj kaj revoluciaj kadroj sur la fronto de kemia kaj medikamenta industrioj kaj en la departementoj de financo, komerco kaj sanprotektado, kiuj tenas revolucion kaj stimulas produktadon, alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso dum la granda kultura revolucio.

Laŭ la brila instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon**”, ĉifoje la plej grandan mezuron de prezredukto havas la ordinaraj medikamentoj ofte uzataj de la laboranta popolo, precipe de la vastaj laborantaj amasoj en la kamparo. Ekzemple, la prezo de ampolo da penici-

lino (kun 200,000 internaciaj unuoj) reduktiĝis je 46 procentoj kaj estas je 90 procentoj malpli alta ol tiu en 1952; la prezo de ampolo da dihidrostreptomicino (kun 1,000,000 internaciaj unuoj) estas nun je 63 procentoj malpli kara ol antaŭ la redukto kaj je 94 procentoj malpli alta ol tiu en 1952; la prezo de kontraŭinflamaj tablojdoj reduktiĝis je 13.3 procentoj kaj estas je 67 procentoj malpli alta ol tiu en 1952; la prezo de sulfadiazinaj tablojdoj reduktiĝis je 50 procentoj kaj estas je 66.5 procentoj malpli alta ol tiu en 1952; la vaste uzataj aspirinaj tablojdoj, kies prezo estis origine tre malalta, estas denove reduktita je 20 procentoj.

Samtempe kun la plenampleksa redukto de la prezoj de medika-

mentoj, estas alprenita plie revolucia paŝo por unuigo de la medikamentaj prezoj tra la tuta lando. Rezulte de tio prezaj diferencoj malaperis inter diversaj regionoj kaj ankaŭ la fenomeno, ke ju pli fora estis la regiono, des pli altaj estis la tieaj medikamentaj prezoj. Tio reduktas la medikamentajn elspezojn por la vasta laboranta popolo en montregionoj kaj kamparo kaj por tiu de diversaj naciecoj en limregionoj. La grandmezura prezredukto de medikamentoj kaj la abolo de regionaj prez diferencoj havas gravan signifon por disvolvi kaj firmigi la kooperan kuracistemon en la kamparo kaj akceli la disvolvon de tiea kuraca kaj higiena afero.



Supre maldekstre:

La 10,000-tonela dragŝipo "Ging Song" de skrapa kaj suĉa tipo, kiun nia lando konstruis mem, surakviĝas.

Supre meze:

La unua elektrona rapida telegrafricevilo por ĉinaj ideografajoj projektita kaj konstruita de la laboristoj kaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj de nia lando

Supre dekstre:


La 5000-ĉevalpova hidraŭlika dizel-lokomotivo, kiun nia lando mem projektis, naskiĝis en la Sifang-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko en Kingdaŭ.

Malsupre dekstre:



Responde firme al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "teni la revolucion, stimuli la produkton", la revoluciaj laboristoj de la Unua Ilmaŝina Fabriko de Ŝenjang ĉiumonate superplenumis la produktan planon en la kuranta jaro. En la bildo estas ilmaŝinoj nove produktitaj de la 2-a laborejo de la fabriko transportotaj por subteni la socialisman konstruadon.

Malsupre meze:

La unua atefika kaj bonkvalita aŭtomata batsolidiga maŝino por fervoja balasto, kiu anstataŭas pezan korpolaron de fervojaj laboristoj, estas projektita kaj konstruita mem de la Ŝenjang-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko.



Fruktoj de "Sinapogo sur la Propraj Fortoj"





Ĉinio Fabrikis 32-tunan Kamionon de Aŭtomata Malŝarĝo

La laboristoj faras la lastan kontrolon pri 32-tuna mineja kamiono de aŭtomata malŝarĝo.

VENIS en la mondon la unua 32-tuna mineja kamiono de aŭtomata malŝarĝo, projektita kaj produktita de nia lando mem! Tio ĉi estas iniciato en la historio de aŭtomobila industrio de nia lando, granda venko akirita de la ŝanhajaj laboristoj kun glora revolucia tradicio en firma efektivigo de la principo de Prezidanto Maŭ “sendependeco kaj memstareco” kaj giganta frukto de la Granda Proletara Kultura Revolucio.

Tiu ĉi peza kamiono de aŭtomata malŝarĝo larĝas 3.5 metrojn, longas 7.5 metrojn kaj pezas pli ol 20 tunojn. Inter la pezaj minejaj kamionoj de nia lando, ĝi estas la plej portiva kun plej progresinta teknologio. Kaj por projekti kaj sukcese produkti ĝin oni uzis nur iom pli ol duonjaro.

Peza kamiono de aŭtomata malŝarĝo estas unu el la gravaj ekipaĵoj por mineja produktado. Sekve de la impeta disvolviĝo de la minekspluata industrio de nia lando, ĉiam pli akriĝis la bezono de la minejoj pri pezaj kamionoj de aŭtomata malŝarĝo.

Sed antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj elmetis la reakcian absurdaĵon “havigu al ni aŭtomobilojn de eksterlande kaj akiru aŭtomobilajn maŝinpecojn enlande” por oponi kontraŭ la principo “sendependeco kaj memstareco” elmetita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kaj ĉiamaniere malhelpis la produkton de pezaj kamionoj de aŭtomata malŝarĝo.

Kvazaŭ printempa tondro eksplodis la Granda Proletara Kultura Revolucio, kiu ĝisfunde ruinigis la kontraŭrevolucion reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj frakasis la katenon, kiu longtempe katenis la disvolviĝon de la sociaj produktivaj fortoj. Kiam la gvida instanco elmetis la taskon de projekto kaj fabriko de 32-tuna kamiono de aŭtomata malŝarĝo en januaro de la kuranta jaro, la ŝanhajaj laboristoj brave prenis sur sin tiun gloran taskon, kun senlima fideleco al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

En projektado kaj fabrikado de la 32-tuna kamiono de aŭtomata malŝarĝo, sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ, ke **“la ĉina popolo havas fortan volon kaj grandan kapablon, kaj nepre atingos kaj superos la avangardan mondan nivelon en proksima estonteco”**, la ŝanhajaj laboristoj efektivigis la principon de **“sinapogo sur propraj fortoj”** kaj iris la propran vojon de Ĉinio en disvolvo de industrio. En projektado, ili aplikis serion da memkreitaj avangardaj strukturoj kaj teknikoj, laŭ la postulo de dekliveascendo kaj la bezono malpezigi la laboron de ŝoforo.

Samtempe kun la projektado, la fabriko ricevinta la taskon de fabrikado jam komencis la provadon. La revolucia komitato de la Ŝanhaja Aŭtofabriko fondis specialan oficejon por direkti tiun batalon. Por plej rapide elfari produktaĵojn, laboristoj de la Ŝanhaja Dizel-fabriko, kiuj prenis sur sin la taskon de fabrikado de la motoro, or-

ganizis **“batalgrupon de motoro”**. Prenante la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko* kiel vojmontrilon, ili kaj studis kaj aplikis ĝin, kaj interkonsiliĝis kolektive, kiam ili renkontis malfacilojn. Fine, ili plenumis sian taskon de fabrikado de motoro antaŭ la fiksita dato. En la pasinteco, la Ŝanhaja Fabriko de Aŭtomobilaj Dentradoj povis produkti nur malgrandan dentradan rapidvariigilon. Kiam ĝi ricevis la taskon de fabrikado de hidraŭlika rapidvariigilo por 32-tuna kamiono de aŭtomata malŝarĝo, ĝi havis nek planon, nek tian fabrikaĵon por imiti. Sed malfaciloj ne povas timigi laboristojn armitajn per Maŭzedongpenso. Post obstina penado, fine ili sukcese elfaris avangardan hidraŭlikan rapidvariigilon kun kvalito konforma al la postulo.

Kaj dank’ al kunlaboro de diversaj koncernaj fabrikoj, sukcese elproduktiĝis la 32-tuna kamiono de aŭtomata malŝarĝo antaŭvespere de la 20-a Nacia Festo de nia lando.

KURANTAJ AFEROJ

Emulsia Pulvoro de D. D. T.

Kun proletara iniciatemo, la revoluciaj laboristoj de la Bengbu-a Fabriko de Agrikulturaj Vermifugoj de Anhuj-provinco sukcese provfabrikis specon de emulsia pulvoro enhavanta 50 procentojn de D. D. T., uzante porksangon liveratan de la Viand-prilaborejo en la sama urbo kiel emulsiigan substancon. La sukceso de tiu ĉi eksperimento malfermis larĝan vojon por disvolvi la produktadon de agrikulturaj vermifugoj.

Antaŭe, por produkti emulsian pulvoron de D. D. T., oni devis uzi grandkvante bazan industriaran materialon benzeno kiel solvilon, kaj krome oni devis uzi relative multekostan emulsiigan substancon. Malsekura estis la produkto kaj neoportune uzebla estis la produktaĵo. Nun, por produkti emulsian pulvoron de D. D. T., la Bengbu-a Fabriko de Agrikulturaj Vermifugoj tute ne uzas benzenon kaj emulsiigan substancon kutime uzatan. La produktado, pakado, transportado, konservado kaj uzado de tia pulvoro estas sendanĝeraj kaj facilaj kaj krome la produktokosto estas relative malalta. Por ĝin uzi, oni bezonas nur enmiksi akvon, fari kirladon kaj la fluido jam taŭgas por disŝprucigado.

Elektrona Rapida Telegrafricevilo por Ĉinaj Ideografiaĵoj

Naskiĝis la unua elektrona rapida telegrafricevilo por ĉinaj ideografiaĵoj kreita de nia lando! Tio ĉi estas iniciato en la telekomunika historio de nia lando kaj granda venko akirita de ĉinaj telekomunikaj laboristoj kaj teknikistoj en firma efektiviĝo de la principo de Prezidanto Maŭ **“sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”**.

La nova elektrona rapida telegrafricevilo por ĉinaj ideografiaĵoj, por kiu oni aplikis transistorajn kaj aliajn modernajn partojn kaj statikelektran registran metodon, estas ekipaĵo por aŭtomataj deĉifrado kaj presado de ideografiaĵoj kun granda rapideco. Ĝi povas aŭtomate ekfunkcii, aŭtomate deĉifri telegraman tekston de arabaj ciferoj en ĉinajn ideografiaĵojn kaj ilin presi (ne per presliteroj) sur telegraman formulon klare kaj senerare, kiam la alia flanko alsendas telegramon. La maŝino povas deĉifri kaj presi 1,500 ĉinajn ideografiaĵojn en ĉiu minuto, t.e. je 75-obla rapideco de homlaboro, kaj levas la rapidecon kaj kvaliton de nia telegrafa komuniko al monda nivelo.

HINBIAN:

Nova Fizionomio de Magazeno



La Unua Magazeno de Ŝanhajo

KIAM vi eniras en la Unuan Magazenen de Ŝanhajo, tuj saltas en viajn okulojn diverskoloraj, praktikaj kaj popularaj varoj, kiuj plenigas la bretarojn kaj vendotablojn. Aĉetablaj estas tie ĉiaj specoj kaj varioj de varoj.

Tamen, plej loga kaj kortuŝa estas la fervora servo de kamaradoj vendistoj al aĉetantoj. Aflablaj vizaĝoj, paciencaj kaj rapida elektado de varoj por aĉetantoj ... tiu nova revolucia laborstilo portas al aĉetantoj pli da ĝojo, ol kiom ili sentas aĉetinte ŝatatajn varojn.

Tutkora servado al proletara politiko kaj al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj fariĝis klara politika direkto de la magazeno. La vendistoj rigardas servadon al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kiel akcepton de ilia reeduko, kaj sian laboron kiel propagandon de Maŭzedongpenso.

Stari ĉe vendotablo por revolucio kaj servi al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, tio ja ne estas malplena vorto. Post vizito al magazeno, vi komprenos ĝian praktikan signifon. Antaŭ iu vendotablo iu patrino estas elektanta bezonaĵon por sia filo ironta al kamparo. La vendisto pensas, antaŭ ĉio, ke rilate al siaj gefiloj — la revoluciaj posteuloj, estante revolucia patrino, ŝi devas zorgi ne nur pri iliaj manĝaĵoj, vestaĵoj kaj aliaj bezonaĵoj, sed ankaŭ pri ilia ideologia revoluciigo. Kion devas porti kun si intelektaj junuloj irontaj al kamparo kaj montregiono por revolucii? Ĉu multenhavan pakaĵon aŭ decidemon ricevi reedukon fare de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj? “Ju pli granda estas la pakaĵo, des pli peza balastaĵo ĝi fariĝas.” Do la vendisto servas al la revoluciaj famaliestroj kiel “konsilantoj” montrante, kion ili devas aĉeti, kion ne,

tiel ke multaj famiĉestroj aĉetis ekonomiajn, praktikajn kaj signifplenajn objektojn. Antaŭ forlaso de la magazeno la lastaj diris kortuŝite: “Ne negocon vi faras sed Maŭzedongpenson vi propagandas.”

La vendistoj de la magazeno efektivigas la instruojn de Prezidanto Maŭ en sia agado. Post publikigo de la instrukcio de Prezidanto Maŭ “necesas forte teni la produktadon de ŝtofo”, la vendistoj tuj propagandis al aĉetantoj la gravan signifon de ŝparado de ŝtofo. Se vi staras nur iom da tempo ĉe vendotablo de ŝtofo, vi povas konstati kiel la vendistoj zorgeme kalkulas por ŝpari ŝtofon por la ŝtato en servado al la aĉetantaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Tie iu vendisto faras mezuradon por iu laboristino. Li estas neniu alia ol kamarado Ju, membro de la revolucia komitato de la magazeno kiu laboris ĉe vendotablo kelkdek jarojn. La Granda Proletara Kultura Revolucio pli profunde komprenigis al li la signifon de servado ĉe vendotablo por revolucio, kaj post kiam li fariĝis gvidanto, li ankoraŭ daŭrigas

sian servadon ĉe vendotablo.

“Kamaradino, por via ĉemizo kvar futoj kaj kvar coloj da ŝtofo jam sufiĉas”, fininte la mezuradon kaj kalkulinte en penso kamarado Ju diris al la laboristino.

“Bonvolu detondi por mi kvar kaj duonan futojn, ĉar antaŭe mi kutime prenis tiun mezuron.”

Estis nur diferenco de unu colo da ŝtofo! Sed kamarado Ju ne neglektis tiun colon da ŝtofo, ĉar li scias ke unu futo, dek futoj aŭ cent futoj da ŝtofo estas senescepte teksitaj colon post colo. Ne grave estas neglekti colon da ŝtofo, sed grave estas neglekti en penso la plenumon de la koncerna instruo de Prezidanto Maŭ! Kamarado Ju denove prenis la mezurbendon kaj iom faris al tiu laboristino mezuradon kaj klarigis al ŝi por vesto kun kiaj longeco kaj vasteco sufiĉas kvar futoj kaj kvar coloj da ŝtofo. Akceptinte la konsilon de kamarado Ju la laboristino kontente prenis la mezuritan ŝtofon.

Politika laboro estas vivlinio de ĉiu ekonomia

Belaj kaj buntaj emajlaj kaj aluminiaj objektoj en la Unua Magazeno de Ŝanhajo



laboro. Socialisma komercado ja tute ne estas negoco por profito, nek afero nur pri varoj kaj mono, tamen en ĝi elstariĝas proletara politiko. Antaŭ vendotablo de papero, kelkaj vendistoj samtempe servas al aĉetantoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La vendisto kun alta staturo demandis iun aĉetiston de fabriko: “Por kia uzo vi aĉetas tiom da papero?”

“Mimeografi dokumentojn por studo”, respondis la aĉetisto.

“Ĉu ilin oni bindos?”

“Ne necesas. Ili estos disdonitaj al kamaradoj laboristoj.”

“Tiam”, daŭrigis la vendisto, “prenu paperon kun naŭon-folia formato!”

“Ni al kutimiĝis uzi paperon kun okon-folia formato. Tiu kun naŭon-folia formato estas neoportuna por mimeografo!”

“Kutimo estas ŝanĝebla. Ankaŭ papero kun naŭon-folia formato taŭgas por mimeografo, kaj krome, uzante paperon kun naŭon-folia formato oni povas ŝpari naŭonon de la paperfolioj, t.e., tiom da paperfolioj por ok laboristoj nun jam

sufiĉas por naŭ laboristoj en studado.”

“La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni ‘**ŝpare faru revolucion**,’ daŭrigis la vendisto, “ni devas fari ĉion laŭ la principo de ŝparemo.” La aĉetisto akceptis la proponon de tiu vendisto kaj laŭdis: “Kiel valorega estas via spirito!”

Estas negocoj grandaj kaj malgrandaj. Tamen ĝuste en tiuj malgrandaj negocoj oni povas vidi la ŝanĝiĝon de la spirita fizionomio de la kamaradoj vendistoj. En tiu granda magazeno kun plankareo de 17,000 kvadrataj metroj, la vendistoj fervore faras eĉ negocon de unu groŝo. Ĉu vi aĉetas unu leterpaperon, unu butonon, kelkajn kudrilojn aŭ najlojn, vi ricevas same tian servon. Kio montriĝas en tio? En tio montriĝas la socialisma naturo de la magazeno.

Kiam oni eniras en la Unuan Magazenon, oni trovas, ke la proksimume 40,000 diversspecaj varoj ĉiuj estas produktitaj de nia lando mem! Tio estas granda venko de la orientilo de **sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj.** Kaj kiom fiera oni povas sin senti, estante ĉina popolo en la epoko de Maŭ Zedong.

Aparta sekcio estas starigita por servi al aĉetantoj de la 6-a horo matene ĝis la 12-a horo noktmeze. Tiu aranĝo trovas varman laŭdon de la vastaj amasoj.



Laŭdkantoj pri Riĉa Rikolto

Sonoras tra la Bordoĵ de la

Irigacia Sistemo Ruĝa Flago

ĈE la piedo de Tajhang-montaro en Linhian-gubernio de Henan-provinco aperis impone grandioza sceno de prospera socialisma nova montregiono. Kaj ĉe Tajhang-montaro kaj sur la bordoĵ de la irigacia sistemo Ruĝa Flago ĉie sonoras laŭdkantoj pri riĉa rikolto.

Kun la revolucia spirito de Malsaĝa Avo, kiu translokigis montojn, la popolo de la tuta gubernio batalis kontraŭ la ĉielo kaj la tero, fendis montojn por trakonduki riverfluojn kaj post pli ol unujara peniga batalado sukcese konstruis 481 kanalojn ĉe la piedo de Tajhang-montaro kun totala longeco de 948 kilometroj, 4 elektrejojn kaj 154 elektrajn pumpstaciojn por drenado kaj irigaciado kaj kompletigis la tutan irigacian sistemon Ruĝa Flago multe, rapide, bone kaj ekonomie, tiel ke en la tuta gubernio formiĝis akvoutiliga sistemo kiu

povas konservi akvon, irigacii kaj fordreni superfluan akvon. Ĝi ŝanĝis la malriĉan montregionon, kie sekeco okazis en naŭ jaroj el ĉiu jardeko, en riĉan montregionon.

MARŜI ANTAŬEN EN INTENSA BATALO INTER LA DU LINIOJ

La irigacia sistemo Ruĝa Flago estis ekkonstruita en 1960. Dum la konstruado iris intensa batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj kaj ankaŭ ripetada batalo inter progresintaj kaj malnovaj pensoj. La komencaj jaroj de la konstruado de la irigacia sistemo estis ĝuste la tempo, kiam nia lando renkontis portempajn malfacilojn en ekonomio pro okazo de naturaj katastrofoj en sinsekvaj jaroj. La renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Henan-


provinco kaj Linhian-gubernio ĉiamaniere malhelpis kaj subfosis la konstruadon de la irigacia sistemo Ruĝa Flago entreprenatan de la popolo de Linhian-gubernio kiu alte tenas la tri ruĝajn flagojn kaj sin apogas sur la propraj fortoj; kaj, prenante la portempajn malfacilojn renkontitajn en la konstruado kiel pretekston, ili donis unu post alia nigrajn instrukciojn, ke oni “tuj bremsu kaj haltigu la konstruadon”.

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, disvolvante la revolucionan spiriton kuraĝi pensi, kuraĝi sturmi kaj kuraĝi agi, la popolanoj de Linhian-gubernio kun glora revolucia tradicio lernis en konstruado teknikojn, kiujn ili ne sciis, kaj mem faris ekipaĵojn kaj materialon, kiuj mankis al ili. Fine en aprilo de 1966, ili sukcese finkonstruis la ĉefan kanaltrunkon 70 kilometrojn longan kaj la tri kanalbranĉojn kun totala longeco de 101.5 kilometroj, per kiuj ili kondukis akvon de Ĝangherivero en Pingŝun-gubernio de Ŝanhi-provinco al Linhian-gubernio. Kaj sekve de tio, antaŭenpuŝate de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj disvolvante la

spiriton de daŭra kaj ĝisfunda revolucio ili sukcese finkonstruis branĉetajn irigaciajn kanalojn kun longeco de 948 kilometroj antaŭvespere de la Unua de Julio en la kuranta jaro, tiel kompletigante la tutan irigacian sistemon Ruĝa Flago kaj vastigante la areon de irigaciataj kampoj de la gubernio de malpli ol dek mil muoj ĝis sescent mil muoj en la tuta gubernio.

ĈIO LAŬ LA PRINCIPO DE SINAPOGO SUR LA PROPRAJ FORTOJ

La konstrua laboro por kompletigo de la irigacia sistemo Ruĝa Flago estas kolosa kaj peniga.



Disvolvante la revolucionan spiriton “timi nek malfacilojn nek morton” la heroaj amasoj de Linhian-gubernio hakas montojn por starigi la irigacian sistemon “Ruĝa Flago”, traborante montojn kaj konstruante pontojn super valoj.

La revolucia komitato de Linhian-gubernio funkcianta kiel komandejo de la konstrua batalo profunde komprenis, ke kiom ajn grandaj estas la malfaciloj, oni tamen povas venki ilin kaj krei miraklojn en la mondo, se nur oni elstarigas proletaran politikon, forte tenas revoluciigon de la homoj, kredas la amasojn, sinapogas sur ili kaj respekti ilian iniciatemon, kaj se oni nur senŝanceliĝe plenumas la grandan politikon de Prezidanto Maŭ pri “sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”.

En la komenco de la kuranta jaro, kiam la dua

branĉeto de la tria branĉo de la irigacia sistemo Ruĝa Flago venis al Ĝaŭgjunnaŭ de la Suda Monto en Dingje-brigado de Donggang-komunumo transirinte montojn kaj riveretojn, ĝi estis haltigita de larĝa valo. Por antaŭen konduki la fluon de la kanalo al Hutoŭ-monto sur la transa bordo estis necese konstrui aeran akvedukton 550 metrojn longan.

Kiel konstrui tiun plej grandan akvedukton de la irigacia sistemo Ruĝa Flago, nome la akvedukton Aŭroro? Prezentiĝis du absolute malsamaj opinioj:

Iuj kun konservativa penso ne kredis, ke “**la amaso estas vera heroo**”. Ili superstiĉe kredis la burĝarajn “specialistojn” kaj “aŭtoritatulojn” kaj diris: “Havante nek projektajn desegnojn, nek konsultan materialon, nek mekanikajn ekipaĵojn, eĉ en tri jaroj oni ne povos kompletigi tiel grandan

konstruon nur per la forto de kamparanoj.” Sed la revoluciaj kadroj kaj revoluciaj amasoj firme kredis, ke ili certe povos konstrui la akvedukton.

En intensa batalo inter la du specoj de pensoj komenciĝis la konstruado de la giganta akvedukto Aŭroro.

Ne estis projektaj desegnoj. La “indiĝenaj specialistoj” maljunaj malriĉkamparanoj Guo Hingbaŭ kaj Vang Ŝulong do faris la unuan projektan desegnon por la akvedukto, laŭ sia sperto akumulita dum la multjara konstruado de kanaloj kaj per koncentro de la saĝo de la amasoj. Ne estis ligno. Multaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj do sendis al la konstruejo sian lignon pretigitan por konstrui novajn domojn. Ne estis kalko. Ili do preparis ĝin per siaj manoj. Ne sufiĉis portiloj, komunumanoj do iris profunden en la montojn 15 kilometrojn

La grandioza irigacia sistemo “Ruĝa Flago” zigzage serpentumas sur Tajhang-montaro.



fore pasante tra glacio kaj neĝo spite al frostego, detranĉis vergojn kaj plektis korbojn el ili. Ĉiuj laboroj sur la konstruejo estis faritaj laŭ la principo de sinapogo sur la propraj fortoj, kaj fine dank' al la komuna klopodo de la vastaj amasoj de komunumanoj kaj revoluciaj kadroj sukcese konstruiĝis dum pli ol du monatoj la akvedukto Aŭroro, kiu estis nefinkonstruebla per tri jaroj laŭ la aserto de la konservativuloj.

Samtempe kun la monthakado kaj konstruado de akveduktoj por la kompletigo de la irigacia sistemo Ruĝa Flago, la komunumanoj streĉe konstruis 4 elektrejojn kaj 154 elektrajn pumpstaciojn por drenado kaj irigaciado, por ke ankaŭ la kampoj super la nivelo de la kanalaro povu esti irigaciataj. Ankaŭ en tiu laboro la komunumanoj iris same la vojon de sinapogo sur propraj fortoj kaj faris heroan batalon por defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ.

Antaŭvespere de la ekkonstruo de la Fenŝujling-a Elektrejo de la irigacia sistemo Ruĝa Flago, venis de supera instanco kelkaj teknikaj "aŭtoritatuloj" kaj specialistoj pri akvoutiligo. Apenaŭ atinginte la konstruejon ili priskribis konstruadon de elektrejo kiel ion misteran kaj postulis ke oni faru laŭ iliaj opinioj, konfidu la projektadon kaj pretigon de bluplanoj al ili kaj la konstruado estu farita mekanike per faka brigado alsendota de ili, unuvorte, "kotkruruloj ne povas mastri elektran tigron".

Dum la konstruado de la elektrejo, la "specialistoj" kaj "aŭtoritatuloj" diris, ke "nepre necesas ŝtala tubego kun diametro de 1.2 metroj kaj longeco de 105 metroj". Ili ankaŭ postulis: "Se oni faros la tubon el cemento, oni devas uzi tiun fabrikitan de Ĉangbajŝan. Kaj krome oni devas aĉeti tiucele kompletan da mekanikajoj kiaj betonmiksmaŝino kaj tremfirmigilo."

La komunumanoj ne aŭskultis tion. Ili forĵetis la fremdlandajn dogmojn kaj malnovajn rutinojn kaj entreprenis la konstruadon de la elektrejo sin apogante sur la propraj fortoj. Ili ne uzis cementon fabrikitan de Ĉangbajŝan nek aĉetis mekanikajn ekipaĵojn, sed dank' al siaj ruĝa koro kaj ambaŭ manoj sukcese fabrikis du gigantajn ferbetonajn tubojn kun diametro de 1.2 metroj kaj longeco de 105 metroj, post tagnokta luktado dum unu monato.

Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, en majo de la pasinta jaro, finkonstruiĝis la Fenŝujling-a Elektrejo de la irigacia

sistemo Ruĝa Flago kun kapacito de pli ol 3,000 kilovatoj. La administrantoj de la elektrejo laboras samtempe kiel laboristoj kaj kamparanoj, kaj la "kotkruruloj" venkis la elektran tigron.

SUPERU ĈIUJN MALFACILOJN POR AKIRI VENKON

La ruĝa suno lumigas la piedon de Tajhangmontaro kaj Maŭzedongpenso nutradas la nuntempajn "Malsaĝajn Avojn".

En la brilaj tagoj de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la komunumanoj batalantaj sur la konstruejo de la irigacia sistemo Ruĝa Flago levis la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso al nova alta tajdo. La vasta akvoutiliga konstruejo fariĝis granda lernejo de Maŭzedongpenso. Viva studo kaj viva aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ akcelis la ideologian revoluciigon de la homoj kaj aperis inter ili miloj kaj dekmiloj da nuntempaj "Malsaĝaj Avoj" en monthakado kaj kanalkonstruado. La Roto de Malsaĝaj Avoj de Bajŝivan-brigado de Heŝun-komunumo honore nomata "Malsaĝa Avo de la Norda Monto" ja estas elstara reprezentanto.

Post la Norda Monto de Heŝun-komunumo sin trovas Bajŝivan-brigado, Huanggiapo-brigado kaj aliaj 5 brigadoj. Tie staras montpintoj unu apud alia, ekstreme malabundas akvofontoj kaj en naŭ el dek jaroj plagas trosekeco.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, senprecedence populariĝis la granda Maŭzedongpenso. Kuraĝigate de la Granda Proletara Kultura Revolucio, post viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la sep brigadoj post la Norda Monto starigis en si ĉielŝanĝan batalvolon, kaj decidis unuiĝi kaj konduki la akvon de Ĝangherivero sur la Nordan Monton, dishakante montojn kaj konstruante kanalon kun la monttranslokiga revolucia spirito de la Malsaĝa Avo, sin apogante sur la propraj fortoj.

Por konduki la akvon de Ĝangherivero sur la Nordan Monton, oni devis konstrui kanalon kun longeco de pli ol 15 kilometroj, kiu devis ĉirkaŭflui pli ol cent montpintojn, transflui pli ol sepdek profundajn ravinojn kaj traflui 12 tunelojn kun totala longeco de 6 kilometroj. La konstrua laboro estis peniga kaj malfacilplena.

En frosta vintra monato decembro, la Roto de Malsaĝaj Avoj kaj komunumanoj de aliaj brigadoj


venis kun la brila verko de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* al la konstruejo de la Kontraŭimperiisma Tunelo ĉe Ĝuŝatuo, spite al neĝblovo kaj frostoj kaj komencis streĉan bataladon.

Ĉe Ĝuŝatuo staras groteskaj rokoj, altas la monto kaj malmolas la ŝtonoj. La kanalo tamen nepre devis traflui la monton tra tunelo pli ol 1,400 metrojn longa.

Pasis jam duona monato, sed oni faris tunelon malpli ol 5 metrojn longan. Kiam oni povos fari tunelon 1,400 metrojn longan tiel farante? Kaj kiam oni povos finkonstrui la tunelojn kun totala longeco de 6,000 metroj

Firmaj estis la rokoj, sed ankoraŭ pli firma estis la ĉielŝanĝa decido de la vastaj amasoj de komunumanoj. Sub la persona gvido de la respondecaj kamaradoj de la gubernia kaj komunuma revoluciaj komitatoj, ili venkis malfacilegojn unu post

alia. Komence de la lasta printempo, altiĝo de la temperaturo tre malfavoris al eligo de fumo el la tunelo post eksplodigo. Por garantii la iradon de la konstruo, la membroj de la Roto de Malsaĝaj Avoj disvolvis la revolucian spiriton timi nek penadon nek morton kaj ĉiutage eniris en la tunelon antaŭ la difinita horo por elpeli fumon per branĉoj kaj vestoj. Foje, kiam oni eksplodigis minon, la dinamito en la truo fuzis anstataŭ eksplodi pro nefunkcio de la prajmo, kaj estigis ruliĝantan fumtorenton. Komunisto Li Hegiang ekpensis, ke la konstruado estos serioze malhelpata kaj povos eĉ okazi neatendita eksplodo, se oni lasos la dinamiton daŭre fuzi kaj ne povos elpeli la fumon. Tion pensante, li sin jetis en la tunelon spite al la danĝero. Baldaŭ kiam li proksimiĝis al la mintruo, li svene falis pro la densega fumo. Tiam li ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**, kaj kun plena kuraĝo li



Guogiaĝuang-brigado de Ĉengguan-komunumo, kiun trafluas la unua kanal-branĉo de la irigacia sistemo “Ruĝa Flago”, denove akiris riĉan rikolton ĉijare.

rampis al la mintruo kaj atenteme estingis la brulantan dinamiton.

La heroo ago de Li Hegiang kiu timis nek penadon nek morton por la revolucio, rapide diskonigi tra la tuta konstruejo kaj profunde kortuŝis kaj edukis la vastajn amasojn de komunumanoj. Post pli ol unujara pena luktado, ili fine sukcesis konduki torentan fluon de Ĝanghe-rivero sur la Nordan Monton en la ĝojplenaj tagoj de la solena inaŭguro de la Naŭa Kongreso de la Partio. Dank’ al tio, pli ol 5,000 muoj el la pli ol 8,000 muoj da tero sur la monto fariĝis irigaciata sen akvolevo kaj 2,000 muoj fariĝis irigaciata per levita akvo. Kun ĝojo la popolanoj kantas:

*Jen ŝtuparkampoj kuŝas unuj ĉe aliaj,
Kaj montojn ĉirkaŭbrakas fluoj irigaciaj.
La Norda Mont’ prezentas bildon tute novan,
Laŭ volo de l’ Malsaĝaj Avoj multe povaj.*



Liberigo de Nankino

HE KEHI

POST la tri grandaj kampanjoj de Liaŭŝen, Huajhaj kaj Pinggin, kiuj havis decidan signifon en la historio de nia Liberiga Milito, la ĉefa forto de la reakciaj trupoj de Kuomintango estis ekstermita, kaj la lakeo de la usonaj imperiistoj Ĉiang Kajŝek kaj lia dinastio estis tuj pereontaj. Tiam, la ĉefa tasko, kiun la ĉina popolo alfrontis, estis rapide militiri trans Jangzi-riveron kaj liberigi la tutan Ĉinion!

En januaro 1949, por konservi siajn postrestantajn fortojn kaj reakiri sian spiradon, sub la apogo de la usona imperiismo, la reakcia registaro de Kuomintango publikigis deklaron, en kiu la militkrimuloj petis paciĝon. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ ĝisfunde malkovris la intrigon de paca intertraktado de la malamiko.

En aprilo 1949, laŭ la instrukcio de la Centra Komitato de la Partio, nia miliona armeo aktive preparis sin por tutfrente trarompi la tiel nomatan "mil-lian riverdefendon" de Kuomintango, kaj liberigi la tutan landon. Nia armeo estis ŝarĝita per la glora tasko konkeri de la fronta flanko Pukoŭ situantan norde de Nankino trans Jangzi-rivero kaj okupi Nankinon en oportuna okazo.

La 20-an de aprilo, la Kuomintang-a registaro en Nankino fine

elektis la vojon de interrompo kun la popolo, rifuzinte la "Interkonsenton pri Enlanda Paco". Tuj en la vespero, ni ricevis ordonon de Prezidanto Maŭ: "Antaŭeniru brave; decideme, ĝisfunde, tute kaj komplete ekstermu ĉiujn kuomintangajn reakciulojn en la teritorio de Ĉinio, kiuj kuraĝas rezisti; liberigu la popolon en la tuta lando kaj defendu la sendependecon kaj integrecon de la teritorio kaj suvereneco de Ĉinio."

Ĉar ni jam sufiĉe nin preparis, nia armeo komencis atakon je la nula horo de la 21-a de aprilo. Niaj trupoj batalis tre draste kaj nur en kelkaj horoj ni jam ricevis venkajn informojn de du divizioj, kvankam la malamikoj ankoraŭ kolektis fortojn por kalcitri. Unu divizio konkeris la gubernian urbon de Giangpu okcidente de Nankino, komplete ekstermite la malamikojn; la alia divizio likvidis la antaŭpoziciojn ĉe Puĝen norde de Nankino, kaŭzante al la malamiko pezajn vundojn. Ĝuste en tiu momento, ni ricevis cirkuleran radiogramon de supera instanco: Ekde la lasta nokto, en la meza sektoro, niaj 300,000 soldatoj jam trarompis unue la defendlinion inter Vuhu kaj Anking kaj transpasis Jangzi-riveron.

La disvolviĝo de la situacio klare montris, ke nia miliona armeo rompas la riverdefendon fanfaronatan

de la malamiko sur la 500-kilometra batallinio, kvazaŭ aŭtuna vento forblovas velkintajn foliojn. Do la aliaj divizioj de nia armeo impete enpuŝiĝis en Puĝen kaj Pukoŭ por plej rapide transpasi Jangzi-riveron kaj liberigi Nankinon. En la tago de la 21-a, nia armeo sendis parton de niaj trupoj por minaci la malamikon de dorse per aktiva atako de la maldekstra flanko; kaj la ĉefa forto batalis kontraŭ la malamiko por konkeri ĉiun punkton, ĉiun linion kaj ĉiun reduton en la monta areo norde de Puĝen kaj okupis ĉiujn ĉefajn poziciojn de la malamiko post tutnokta intensa batalo. En la mateno de la 22-a, la malamikoj en Pukoŭ kaj Puĝen timis esti komplete ekstermitaj kaj haste forkuris suden. Por bari la malamikojn, nia armeo rapide persekutis ilin kaj okupis Pukoŭ troviĝantan sur la riverbordo kontraŭ Nankino.

Rigardante sur la bordo, oni povis klare preni en la okuloj la malhele grizan urban muron de Nankino, la ore purpuran Ĝongŝanmonton, la torentantan riverogon... kaj nun el la fama urbo en la historio leviĝis ĉiellekaj fajrokoloroj kaj aŭdiĝis senĉesaj eksplodbruoj. La 22-jara reakcia regado de Ĉiang Kajŝek turnis ĝin en surteran inferon. Kiam venis la lastaj tagoj de la dinastio, la baldaŭ mortonta

malamiko ankoraŭ provis ruinigi ĝin.

Por gajni tempon por forkuri, la malamiko uzis siajn marajn kaj aerajn fortojn en sia furioza rebato kontraŭ ni, verŝante amasojn kaj amasojn da obusoj kaj bomboj sur Pukoŭ. Kaj ĝi forrabis cetere ĉiujn ŝipojn de la norda bordo. Ni ankoraŭfoje pristudis niajn dispozi- cionjn de transpaso de la rivero, pro- vante kiel eble plej rapide transpasi Jangzi. Sed, ni ne povis trovi eĉ unu ŝipon en la tuta Pukoŭ. Ĝuste kiam ni maltrankviliĝis pro tia cirkonstanco, kelkaj popolanoj venis al ni en du boatoj. Ni tuj decidis organizi nin por transpasi la riveron per la boatoj.

En la vespera krepusko de la 23-a de aprilo, tuj kiam la koloraj signal- kugloj leviĝis, obusoj, kiuj havis post si lumstriojn, amase flugis al malami- kaj pozicioj sur la suda bordo de la rivero. Ni elektis 18 sagacajn re- kognoskistojn por unue transpasi

la riveron kun armiloj per tiuj du boatoj sub la ŝirmo de intensa bom- bardo. Tiuj 18 bravuloj kaptis ĉe la kontraŭa bordo malgrandan va- porŝipon, kiu povis porti pli ol 30 homojn, kaj revenis kun ĝi. Je la dua fojo pli ol 30 batalantoj iris tran- sen, kaj ili revenis kun pli granda vaporŝipo, kiu povis porti pli ol 300 homojn. Nun je la tria fojo pli ol 300 personoj transpasis la riveron... Tiam la laboristoj de la kajoj de Hiaguan sur la transa bordo in- formiĝis pri nia intenco kaj tuj veturi- gis grandamase lignajn ŝipojn al la noda bordo por transporti siajn pro- prajn trupojn. Ankaŭ la laboristoj de la Elektra Centralo de Nankino veturigis al ni la vaporŝipojn, kiujn ili kaŝis antaŭe. En la noktomezo, sur la larĝa rivero navede rapidis inter ambaŭ bordoj ĉiaj ŝipoj fen- dante ondojn. Nia tuta armeo estis antaŭen puŝiganta al Nankino.

“Kamaradoj PLA-anoj, penigan taskon vi plenumis!”


“Dankon pro via subtenado, la- boristaj fratoj!”

La salutoj kaj varmaj aklamoj de la laboristoj kaj batalantoj kuniĝis en unu fortan sonon.

Post transpaso de la rivero, ni rapide prenis sub nia kontrolo unue Leono-monton, Zigin-monton kaj aliajn altajn punktojn ĉirkaŭ Nan- kino kaj poste la loĝejon de Ĉiang Kajŝek kaj la rezidejon de la falsa “Prezidanto”. La reakcia regado de Ĉiang-dinastio estis fine renver- sita.

La laboristoj, kamparanoj, urb- anoj kaj lernantoj amase suriris la stratojn por bonvenigi la Popolan Liberigan Armeon kaj festi la liberi- ĝon de Nankino. Ili varme hurais: “Bonvenon al la Liberiga Armeo, kiu liberigis Nankinon!” “Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!” “Vi- vu Prezidanto Maŭ!” La nove nas- kita urbo Nankino estis saturita de ĝojego.

En 1949 la Ĉina Popola Liberiga Armeo okupis la rezidejon de la falsa “Prezidanto” en Nankino kaj proklamis la pereon de Ĉiang-dinastio.



“Revolucio ĝis la Venko!”

— VIZITO AL PALESTINAJ GERILANOJ

SUR la standardo kaj emblemo de “Al-Fatah” (la palestina naciliberiga movado), oni povas vidi okulfrapan sloganon: “Revolucio ĝis la venko!” Tio ne estas slogano ordinara, sed heroa ĵuro de la tuta palestina popolo, kiu decidis

konduki sian armitan batalon ĝis la fino, kaj ankaŭ kategoria respondo al la intrigo de “mez-orienta Munĥeno” planita de la usona imperiismo kaj moderna reviziismo.

Batalantoj de la sturma taĉmento “Al-Assifa” de Palestino ekmarŝas por ataki la malamikojn en teritorio de Palestino okupata de Izraelo, la lakeo de la usona imperiismo.



ARMITA BATALO ESTAS LA UNIKA ELIREJO

Dum mia lastatempa vizito al Jordano, mi aŭdis ĉe multaj palestinaj gerilanoj kaj rifuĝintoj la komunan kaj firman voĉon: Ni absolute ne akceptos la tiel nomatan planon de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo por “paca solvo” de la mezorienta problemo, kaj ni decidis liberigi Palestinon per la pafilo, kaj konduki “revolucion ĝis venko!”

Abu Lotof, unu el la gvidantaj membroj de “Al-Fatah” rememoris sian spertaĵon, kiu havas tre grandan signifon. En 1948, juna Lotof kaj liaj kunlernantoj planis organizi manifestacion por protesti kontraŭ la kruelaĵoj de la cionistoj, kiuj, subtenataj de la usona imperiismo kaj brita imperiismo, grandamase masakris kaj forpelis palestinajn popolanojn. Ĝus kiam nombro da patriotoj kolektiĝis sub ilia gvido, ili tuj ricevis sangan subpremon de izraelaj trupoj kaj multaj patriotoj estis mortigitaj. Lotof sin kaŝis en la hejmo de iu maljuna kamparano kaj la lasta diris al li signifoplene: “Junulo, ja ne taŭgas batali sole kun kelkaj personoj per malplenaj manoj! Ĉar la malamikoj tenas pafilojn enmane. Kiel do estos, se ankaŭ ni havas pafilojn!” La vortoj de la maljuna kamparano komprenigis Lotof: Sen armiloj estas neeble rezisti kontraŭ la sangaj kruelaĵoj de la malamikoj kaj liberigi la hejmlandon

Lotof diris: “Nun nia popolo jam organiziĝis kaj ekprenis armilojn. La revolucio en Palestino venke marŝas antaŭen. Tio teruris la imperiismon kaj diversajn reakciajn fortojn. Nun ili intrigas por trudi al ni kompromisan kaj kapitulacan solvon kaj devigi nin formeti armilojn. Fronte al tiu situacio, ni donis senhezite firman respondon: “Ni rifuzas decideme ĉian ajn intrigon de ‘paca solvo’. Nur per popola milito Palestino povas esti liberigita.”

BATALI POR LIBERIGO DE LA PATROLANDO

Kiom valoras la pafiloj por la nun batalanta palestina popolo! La pafilo signifas forton kaj esperon kaj simbolas venkon kaj liberigon por la palestina popolo vivanta en abismo de suferoj. Abu Khalia, komandanto de iu bazloko de la sturma taĉmento “Al-Assifa” diris trafe: “Ni serĉadis dudek jarojn, ĝis ni fine trovis la grandan veron: **‘El pafilo venas ŝtatpotenco’**. Neniu ajn forto en la mondo povas devigi nin formeti niajn



Juna gerilano de la sturma taĉmento “Al-Assifa” sub “Al-Fatah” sin ekzercas en atako per bajoneto.

armilojn. Ankaŭ la intrigo de ‘paca solvo’ planita de la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo ne povos ŝanĝi nian firman decidon batali sange ĝis la fina venko. Ekde la unua pafado de la sturma taĉmento ‘Al-Assifa’ ni jam sobre antaŭkalkulis la grandan malfacilecon de nia batalo kontraŭ la malamikoj, ĉar niaj malamikoj estas ne nur la izraela cionismo sola, sed ankaŭ imperiismo post ĝia dorso. Ni ne revas, ke nia revolucio venkos rapide dank’ al hazardo, sed pretas longdaŭre batali de generacio al generacio.”

La agresa milito al arabaj landoj lanĉita de la usona imperiismo kaj la izraelaj reakciuloj en la jaro 1967 levis ĉe la palestina popolo revolucion indignan tajdon, kaj la revolucia ŝtormo rapide ŝanĝas ĝian spiritan fizionomion. En bazlokoj de la palestinaj gerilaj taĉmentoj estas videblaj maljunaj batalantoj kun aĝo de pli ol kvindek jaroj kaj multaj junaj knabinoj, kiuj forĵetis siajn vualojn kaj ekprenis armilojn, kaj ankoraŭ 13-14-jaraj heroetoj. La plej ŝatataj kantoj de la gerilanoj estas revoluciaj kantoj kaj ilia plej ŝatata danco estas “mitraleta danco”. Nemalmultaj batalantoj

eĉ ŝanĝis siajn nomojn, ili plej ŝatas nomi sin per la vortoj “Thaura (revolucio)”, “Kifah (batalo)”, “Mujahid (batalanto)” kaj “Fatah (la Palestina Naciliberiga Movado)” ktp.

Ahmed, maljuna batalanto de la sturma taĉmento “Al-Assifa”, diris: “Mi ne ĉesigos mian batalon, nur se mi ankoraŭ havas forton por teni pafilon!” Iu dektri-jara gerilano diris: “Por liberigi Palestinon mi pretas batali la tutan vivon — aŭ mi oferos mian vivon aŭ gajnos venkon!” La 14-jara nova gerilano Assifa Asam diris: “Ĉiuj batalantoj de nia virina kampadejo havas komunan ĵuron: dediĉi ĉion al la liberiga afero de la patrolando!”

BATALI ĜIS LA FINA VENKO

En la Shmillara tendeĵo de rifuĝintoj en la orienta antaŭurbo de Amman loĝas pli ol 18,000 novaj rifuĝintoj el Palestino, kiuj estis elpelitaj el sia hejmo post la milito de “la 5-a de junio”. Ofte tuta familio loĝas kunpremiĝe en malalta kanvasa tendo aŭ en malgranda barako malalte tegmentita per lado kaj vivas mizere. Ili forte esprimis, ke ili liberigos sian hejmlandon per pafiloj. Iu maljunulo nomata Shihad diris: “Ni ne devas esti pelataj tien kaj ĉi tien ĉiam kiel ŝafoj kaj buĉataj laŭvole. Ni nepre devas batali. La usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo volas ke

Izraelo tretu nian hejmlandon eterne kaj ke ni ĉiam restu rifuĝintoj, kaj tion ni absolute ne konsentos!” Shihad havas 12 infanojn kaj ok el ili jam aliĝis al gerilaj taĉmentoj. La maljunulo diris: “Ni havas plenan memfidon pri venko. Ĉar ĉiuj palestinanoj havas la spiriton de sinofero por la patrolando. Ni neniam submetiĝos al ĉiu ajn malamiko. Se nur restas ankoraŭ unu palestinano, li batalos plu.”

En tendeĵo de rifuĝintoj en la norda antaŭurbo de Amman loĝas maljunulino kiu sendis siajn tri filojn al gerila taĉmento. Kaj, krome, ŝi ankoraŭ ofte kudras vestojn por gerilanoj kune kun siaj bofilinoj. Ŝi diris: “Tiu, kiu konas la koron de ni palestina popolo, povas konkludi, ke restas nur unu sola elirejo por la palestina popolo, tio estas armita batalo.”

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruis al ni: “**La popolo, nur la popolo, estas la movforto kreanta la mondan historion.**” La jam leviĝinta palestina popolo nun skribas per pafiloj novan ĉapitron de la historio de nacia liberiĝo. Lasu la usonajn imperiistojn, modernajn reviziistojn kaj la izraelajn cionistojn tremi antaŭ la armita batalo de la palestina popolo! La nefleksebla palestina popolo firme tenos la pafilojn en siaj manoj, solide unuiĝos kontraŭ la malamiko, kuraĝe marŝos antaŭen kaj kondukos la “revolucion ĝis la venko”!

—Raportisto de Hinhua-Novajagentejo



Batalanto de la sturma taĉmento “Al-Assifa” de Palestino celas per bazuko.

Fremdlingvaj Gazetoj el Ĉinio


Por ke la diverslandaj revoluciaj popoloj de la mondo ĝusttempe informiĝu pri la rapida disvolviĝo de la socialisma nova Ĉinio en diversaj flankoj, ni sincere rekomendas al niaj legantoj gazetojn eldonatajn de Ĉinio en diversaj lingvoj. Ili en diversaj flankoj raportas grandajn venkojn akiritajn de la ĉina popolo sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la socialisma revolucio, precipe en la Granda Proletara Kultura Revolucio, kaj iliajn brilajn atingojn en la socialisma konstruado; ili raportas pri la firma opozicio de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo, la moderna reviziismo kaj la diverslandaj reakciularoj kaj pri ĝia subteno al la revoluciaj bataloj de la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo.



El Popola Ĉinio — sinteza gazeto eldonata monate en Esperanto.

Pekina Revuo — politika kaj teoria gazeto eldonata semajne en la lingvoj angla, franca, germana, hispana kaj japana, kaj distribuata al diversaj lokoj de la mondo per aviado.

Ĉinio — grandformata monata bildgazeto belega kun lakona teksto. Krom en la ĉina ĝi estas eldonata ankaŭ en la lingvoj angla, franca, germana, japana, rusa, hispana, araba, hindia, indonezia, itala, sveda, korea, ŝahilia, urdua kaj vjetnama.



Ĉinio en Konstruado — sinteza gazeto riĉe ilustrita kaj eldonata monate en la lingvoj angla, franca, hispana, araba kaj rusa.

Ĉina Literaturo — literatura kaj arta gazeto eldonata monate en la angla lingvo kaj sezone en la franca.

Popola Ĉinio — sinteza gazeto eldonata monate en la japana lingvo.

La supre rekomenditaj gazetoj nun komencis akcepti abonantojn por 1970. Abonu kaj abonigu! Varban faldfolion povas senpage ricevi ĉiu petanto.

Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio
Haveblaj ĉe lokaj librovendejoj aŭ rekte ĉe la Sekcio por Poŝta Mendo, Guozi Shudian, P.O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio



新的 跃进
Xinde Yuèjìn

Nova Antaŭensalto

中国的 工厂 和 农村, 正在
Zhōngguóde gōngchǎng hé nóngcūn, zhèngzài
Ĉinaj fabrikoj kaj vilaĝoj ĝuste nun

掀起 社会主义 竞赛。在 竞赛 中,
Xiānqǐ shèhuìzhǔyì jìngsài. Zài jìngsài zhōng,
levas socialisman konkurson. En konkurso,

许多 工厂 刷新了 历史上的 最高
xǔduō gōngchǎng shuāxīnle lìshǐshàngde zuìgāo
multaj fabrikoj renovigis en historio plej altan

记录, 很多 公社 夺得了 农业
jìlù, hěnduō gōngshè duódele nóngyè
rekordon, multaj komunumoj batalakiris agrokulturan

大 丰收, 到处 呈现 出 新的
dà fēngshōu, dào chù chéngxiàn chū xīnde
grandan riĉrikolton, ĉie montriĝas (el-e) nova

跃进。
yuèjìn.
antaŭensalto.

TRADUKO

Nova Antaŭensalto

En ĉinaj fabrikoj kaj vilaĝoj, oni nun levas socialisman konkurson. En la konkurso, multaj fabrikoj renovigis sian plej altan rekordon en la historio, multaj komunumoj batalakiris grandan riĉan rikolton, kaj ĉie elmontriĝas nova antaŭensalto.



Korespondi Deziras

*Bratu Ion: 19-j. studento, interŝ. fotojn, humetetiketojn, diskojn ktp. respondo garantiita. Adr: str. Grivitei Nr. 408, braila, Romania.

*Jean Clande Thumerelle: el Francio, 3/60 rue Auguste Reneir, 59 Sille, dez. kor. en Kosta Riko, la insuloj de Suda Orienta Azio pri muziko, literaturo kaj por interŝanĝi revuojn, diskojn kaj magnet-sonbendojn.

*K. Johnson: dez. kor. kun ĉiuj landoj pri multaj temoj. Adr: 45 Graham House, Cumberland Rd. London N 9, Anglio.

*Elise Koller, Ringgt 136, Hamar, Norvegio.

*Herber Blumenstiel, dez. kor. kun s-anoj el ĉ.l. pri ĉ.t. Adr: 6735 Maikammer/Pfalz, Hauptstr. 64, Okc. Germanio

*Vicente Garcia, dez. kor. pri ĉio en Azio, Afriko. Adr: Pla. Ametllera 150, Tarrasa (Barna), Hispanio.

*Axel Andersson, Tallg. 11A. Grums, Svedio. dez. kor. kun amikoj de Azio kaj

Afriko. Garantias respondon kaj seriozan korespondadon, laŭ deziro ankaŭ interŝanĝo.

*Bo Jansson, dez. kor. kun gejunuloj de Vjetnamio kaj Japanio. Adr: Folkungatatan 63, Stockholm Svedio.

*Jan Vedevik, Poste Restante, Huvudpostkontoret, GÖTEBORG 1. Svedio. 52-jara laboristo kor. pri ĉiuj temoj ankaŭ pri beletro kaj arto.

*W. M. Peters el Nederlando, Zamenhof 1", Amsterdam(3) Ound West, dez. kor. k. ŝanĝi p. m.

Sur la kovrilo:

Revoluciaj amasoj en diversnaciecaj kostumoj marŝas en Tian-anmen-placon ĉirkaŭ la giganta kaj bele ornamita ĉaro, prezentante la komunan volon de ĉiunaciecaj popolanoj brave marŝi antaŭen plu alte tenante la standardon de unuiĝo kaj venko de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio.

Sur la dorskovrilo:

Vespere de la nacifesta tago, Tian-anmen-placo plenas de bollanta ĝojo.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 12 (137) 1969

Ĉefa Enhavo

Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ Celebris la 20-an Datrevenon de la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko Kune kun Revoluciaj Popolamasoj

Parolado de Vicprezidanto Lin Biaŭ en la Mitingo por Celebri la 20-an Datrevenon de la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko

Batalu por Plue Firmigi la Proletaran Diktaturon

Kamarado Lin Biaŭ en la Periodo de la Liberiga Milito en Nordoriento

La Ruĝa Standardo de Ŝaŭŝan Flirtas en la Vento

Mia Plej Granda Feliĉo

Marnavigo Dependas de Stiristo

Nia Lando Venke Faris Novan Eksplozadon de Hidrogena Bombo kaj Sukcese Faris Sian Unuan Subteran Nuklean Provon

Surgrimpi la Novan Kulminon de Scienco kaj Tekniko Dank' al Maŭzedongpenso

Refoja Grandmezura Prezredukto de Medikamentoj

Novaj Fruktoj de "Sinapogo sur la Propraj Fortoj"

Ĉinio Fabrikis 32-tunan Kamionon de Aŭtomata Malŝarĝo

Nova Fizionomio de Magazeno

Laŭdkantoj pri Riĉa Rikolto Sonoras tra la Bordoĵoj de la Irigacia Sistemo Ruĝa Flago

"Revolucio ĝis la Venko!"

Ĝojigaj Novajoj pri Riĉa Rikolto el Diversaj Partoj de la Lando

Sub direktado de la granda orientilo “**teni la revolucion, stimuli la produkton**”, malriĉkampanoj kaj mal-superaĵ mezkampanoj de Guangming-komunumo de Juŝu-gubernio, Gilin-provinco, luktante kontraŭ la naturo akiris novan venkon en la agrikultura produktado de la kuranta jaro.





Riĉa rikolto en brutobredado de la Hajhi-a Mongola-Tibetana-Kazaĥa Aŭtonoma Subprovinco de Kinghaj-provinco. Jen paŝtistoj de Hongvej-komunumo tondas lanon.




Intelektaj gejunuloj fiksloĝantaj en Dongfanghong-komunumo de Fukang-gubernio, Hingiang, intime batalas kune kun komunumanoj de diversaj naciecoj sur la agrikultura plejfronto.



Batalantoj de PLA kaj popolanoj de Juemiaŭ-komunumo de Huajin-gubernio, Ŝenhi-provinco, gaje falĉas riĉrikoltan tritikon.






Komandante la produkton per la revolucio, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Longhjudau-komunumo de Ĵongĉeng-gubernio, Ŝandong-provinco, batalakiris abundan rikolton de aŭtuna greno.

Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Longkiaŭ-brigado de Ĉangkiaŭ-komunumo, Ĝiangsu-provinco, aktive transportas superfluan grenon por vendi al la ŝtato post riĉa rikolto.

Sceno de abunda rikolto en la tabaka kampo de Gujĉun-komunumo, Hjuĉang-gubernio, Henan-provinco





Malriĉkamparaninoj kaj malsuperaj mezkampaninoj de Bagiaŭ-komunumo de Janting-gubernio, Siĉuan-provinco, studas verkojn de Prezidanto Maŭ dum ripozo de kotonrikoltado.

Abunda rikolto de pomo en Bejgoŭ-komunumo de Penglaj-gubernio, Ŝandong-provinco. Jen komunumanoj estas intense okupataj de rikoltado.



Nova Metiarlo

La Granda Ponto en Konstruado

(mozaiko el konkpecoj)

